ESPERANTO

REVUO INTERNACIA

N-ro 634 (9)
Septembro 1958

Universala Esperanto-Asocio

(En Konsultaj Rilatoj kun U.N.E.S.C.O.)

esperanto

SEPTEMBRO 1958

51a JARO

REVUO INTERNACIA

N-RO 634 (9)

Fondinto: H. HODLER

Honora Redaktoro : HANS JAKOB

Ĉion por la redakcio oni sendu al la Redakcia adreso : S-ino Kirsten Zacho, Randbølvej 4, København, Danlando.

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto (abonado, reklamoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Eendrachtsweg 7, Rotterdam-C., Nederlando. Telefono: Rotterdam 128313. Ĝirkonto: 378964

Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi respektive la redakcion aŭ la Centran Oficejon (vidu supre) antaŭ la 1-a de la antaŭa monato.

Bankisto de U.E.A.:
R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam-C.

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesataj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represaĵon al nia redakcio.

Jara abono (1958): 9,50 n.gld. (kun membreco kaj jarlibro 12,50 n.gld.). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

Tarifo por reklamoj:
1 paĝo 128,— gld ½ paĝo 64,— gld ¼ paĝo 32,— gld ⅛ paĝo 16,— gld 1/16 paĝo 8,— gld

Anoncetoj pri korespondado:
0,10 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj.
Legantoj en 80 landoj.

Estraro de U.E.A.:
Prof. D-ro Giorgio Canuto, prezidanto, Via Chiabrera 37, Torino.

Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario, 77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

H. W. Holmes, O.B.E., vic-prezidanto, 38, Fillebrook Road, London E 11, Britujo.

R. Llech-Walter, estrarano pri financoj, 5 Quai Vauban, Perpignan (Pyr. Or.), Francujo.

D-ro Inĝ. Giordano Azzi, estrarano pri kulturaj aferoj, viale Giulio Cesare 20, Como, Italujo.

D-ro W. Herrmann, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, Bürstädterstr. 3, (16) Lampertheim-Hessen, Germanujo.

Centro de Esploro kaj Dokumentado
77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo, Telefono: ARNold 90-81.

Sur la kovrilpaĝo :

La Urbestro de Mainz, la akso ĉirkaŭ kiu turniĝis la 43-a

Enhavo

La Plej Amikeca Universala Kongreso 129

Projekto de filmo pri "Zamenhof kaj lia Verko" 148

La premio Comella-Bassols 149

Trovitajoj en Mainz 149

Rubrikoj

Fondajo-Zamenhof 149

Radio 149

La internaciaj konkursoj 150

Oficiala Informilo 150

Manuskriptoj por „Esperanto" devas esti klare tajpitaj sur unu flanko de la folioj, kun interlinia spaco, en perfekta Esperanto kaj en du ekzempleroj. Neuzotajn manuskriptojn oni resendas nur kontraŭ afranko aŭ respondkupono.

OFICIALA ORGANO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

(EN KONSULTAJ RILATOJ KUN U.N.E.S.C.O)

La plej Amikeca Universala Kongreso

Dum la bankedo, prezentita de la Ĉefurbestro de Mainz, S-ro Franz Stein, al la membroj de la Estraro de U.E.A., de la L.K.K. kaj al la gvidantoj de diversaj servoj sabaton vespere post la Fermo, Prof. Canuto difinis en sia bela tosto la ĵus pasintan kongreson kiel la plej amikecan, kiun li iam partoprenis. Ĉiu kongresano certe konsentos kun tiu karakterizo.

La milda beleco de la regiono, la plej amika kunlaborado inter la L.K.K. kaj la Estraro de U.E.A. dum pli ol jaro da preparlaboroj, la larĝanimeco de la urbo kaj de ĝia ĉefurbestro, la centoj da flagoj salute flirtantaj en la stratoj kaj ĉirkaŭ la kongresejo, la afiŝaj bondeziroj kun "paco" kiel centra penso, la afableco kaj ĝentileco de la membroj de la L.K.K. kaj la multnombraj aliaj helpantoj — ĉio ĉi jam antaŭ la komenciĝo de la laboroj kreis aparte favoran atmosferon kaj metis sur la kongreson stampon de amikeco. Al tio aldoniĝis la fakto, ke U.E.A. eniris la jaron de la 50-a datreveno de sia fondiĝo pli efika en siaj laboroj, pli unueca spirite, pli granda nombre ol iam antaŭe. La marda jubilea festprogramo, dediĉita al U.E.A., ligis la estantecon al la pasinteco kaj al la perspektivoj por la estonteco sub du sloganoj, esencaj por la plua progresado : "Unueco estas Forto" kaj "Per U.E.A. al la Fina Celo".

Al Urbestro Stein

Urbestro Stein ja estas ŝtono
por fortikaĵo Esperanta :
en la rideto larĝe kantas
la gastameco kaj la bono.

Enket' urbestra estos krono
al la klopod' poresperanta.
Urbestro Stein ja estas ŝtono
por fortikaĵo Esperanta.

La kvardektria ĉiam tronos,
en verda mondo, plej brilanta :
Samideanoj kore dankas
pro la labor' de tiu homo,

urbestro Stein, fortika ŝtono.

G. Azzi

La agordo de amikeco kaj unueco regis ĉiujn laborojn de la kongreso. Tio, tamen, neniel signifas, ke ĝi estis nur amika renkontiĝo kaj nenio pli. Tute male, la Universala Kongreso en Mainz faris pluan grandan paŝon antaŭen ĉiurilate, sed speciale koncerne siajn laborojn en la sekcioj, ĝeneralaj kunvenoj kaj fakaj kunsidoj.

Jam delonge pasis la tempo, kiam la universalaj kongresoj de Esperanto centrigis sian atenton ĉefe al la lingvo mem kaj al organizaj demandoj. Hodiaŭ la lingvo jam estas tre forte enradikiĝinta. Tial, la problemoj, kiujn nuntempe frontas universala kongreso, neniel plu koncernas la lingvon mem, kiel ankoraŭ oni emas kredi en kelkaj medioj, sed la grandajn — precipe kulturajn — demandojn de la mondo, ĉe kio la lingvo estas tute simple utiligata kiel rimedo de komunikado. Tamen, kompreneble, la demandoj ligitaj al plua disvastiĝo de la lingvo ne povas ne okupi sian lokon.

En tia situacio la 43-a Universala Kongreso okupiĝis unuavice pri la t.n. granda projekto de UNESKO sub la ĝenerala titolo "Reciproka Aprezado de la Orienta kaj Okcidenta Kulturaj Valoroj". La Unua Sekcio amplekse pritraktis tiun demandon kaj speciale konsideris la lingvan aspekton de la problemo. La konkludoj estos prezentitaj al UNESKO. Aliflanke, ĉar en tiu ĉi jaro estas en la mondo memorigata la 10-jara datreveno de la akcepto de la Universala Deklaracio pri la Homaj Rajtoj sub la aŭspicioj de U.N. kaj UNESKO, la kongreso dediĉis sian atenton ankaŭ al tiu demando per unu prelego en la I.S.U. kaj per speciala debatvespero de juristoj pri unu artikolo de la Deklaracio.

La ĉefa interna problemo de la Movado — tiu de niaj lokaj societoj kaj grupoj, — estis la temo pritraktita de la Dua Sekcio.

Ankaŭ la kunvenoj de pluraj fakaj kaj specialigitaj organizaĵoj okupiĝis, unuflanke, pri aktualaj problemoj de sia fako kaj, aliflanke, pri demandoj koncernantaj la pli bonan organizon kaj internan vivon de siaj asocioj. La fakto, ke la fakaj organizaĵoj de esperantistoj ĉiam pli kaj pli utiligas la Internacian Lingvon por siaj fakaj celoj estas tre salutinda. Dum la kongreso plurfoje estis akcentita la neceso ampleksigi ĝis plej alta grado la uzon de la lingvo en fakaj kaj aliaj specialaj medioj.

En la sekvanta jaro estos, kiel konate, la centjara datreveno de la naskiĝo de D-ro L. L. Zamenhof. Ankaŭ tiu grava evento estis unu el la ĉefaj punktoj de la kongresa programo. La Internacia Organiza Komitato por memorigo de tiu datreveno kunvenis en Mainz kaj fiksis la definitivan programon de la aranĝoj, kiun oni legos aliloke.

Fine, estas akcentinde, ke en tiu ĉi kongreso oni preskaŭ ne aŭdis la naciajn lingvojn. Ĉiuj raportoj kaj intervenoj en la diskutoj estis faritaj en flua, bonega lingvo. En la akceptejo, en la restoracioj, en la koridoroj, en la kafejoj kaj sur la stratoj de Mainz, ĉie dum ok tagoj oni povis aŭdi diskutojn, amikajn konversaciojn, ŝercadon kaj spritadon en la Internacia Lingvo. Estis vera ĝuo. Kaj, krome, impona manifestacio de unulingva kongreso, sola kaj unika en la hodiaŭa mondo.

Dankon al la tuta L.K.K. kaj al ĉiuj, kiuj per sia laboro en kiu ajn senco kontribuis al la bonege sukcesinta 43-a Universala Kongreso.

I. L.

LA SOLENA INAŬGURO

Kiel ĉiam, la Inaŭguro estis la plej solena momento de la Kongreso. Bedaŭrinde ĝi ne povis okazi, kiel planite, en la granda nova Sportejo de Mainz, ĉar ĝi ne estis finkonstruita ĝustatempe antaŭ la Kongreso. Sekve, la Inaŭguro okazis en la salono Zamenhof, plenigita ĝis la lasta anguleto.

Enkondukis la solenaĵon la Simfonia Orkestro de Mainz sub direktado de la Ĝenerala Muzikdirektoro Prof. Carl Maria Zwiszler per la Baletmuziko de Rameau-Grétny.

La Ĉefurbestro de Mainz, S-ro Franz Stein, samtempe prezidanto de L.K.K., en flua Esperanto bonvenigis la kongresanojn en sia urbo. Li laŭtlegis saluttelegramon de D-ro Konrad Adenauer, Kanceliero de la Germana Federacia Respubliko.

Prof. D-ro Giorgio Canuto, Prezidanto de U.E.A., bonvenigis la Kongreson en la nomo de U.E.A. Li dankis al S-ro Stein pro la invito al Mainz kaj al D-ro Adenauer pro la transpreno de la Honora Protekteco. Li mallonge skizis la apartan karakteron de tiu ĉi Kongreso kaj en la fino de sia parolado petis Prof. Privat, kunfondinto de U.E.A. antaŭ 50 jaroj kaj kun granda ĝojo bonvenigita en tiu ĉi Kongreso, diri kelkajn vortojn. Prof. Privat mallonge skizis la personecon de la fondinto Hector Hodler, lia intima amiko, kaj finis per instigo al la esperantistaro fidele kunlabori kun la hodiaŭaj gvidantoj de la Asocio.

Aparte bonvenigis la Prezidanto Inĝenieron Ludoviko Zamenhof, la nepon de la aŭtoro de la Internacia Lingvo, kiu direktis kelkajn salutvortojn al la Kongreso.

D-ro Sehl, ministeria konsilisto, transdonis la salutojn de la Protektanto kaj de la registaro de Rejnlando-Palatinato.

Rektoro Prof. D-ro Delekat salutis en la nomo de la Universitato de Mainz.

Salutis la oficialaj reprezentantoj de la registaroj **aŭstria, belga, franca, itala, nederlanda, norvega, pola** kaj **sveda.**

Salutis la reprezentantoj de la landaj asocioj aliĝintaj : **aŭstralia, aŭstria, belga, brazila, brita, bulgara, dana, finna, franca, germana, hispana, itala, japana, jugoslavia, maroka, nederlanda. norvega, novzelanda, pola, sarlanda, sveda, svisa, usona.** De la landaj asocioj nealiĝintaj **greka, hinda, islanda** kaj **monaka.** De landoj sen landa asocio salutis reprezentantino el **Sudafriko.**

Post dua muzikaĵo sekvis la festparolado de Prof. Lapenna kiu vekis grandegan entuziasmon kaj estis plurfoje interrompata de aplaŭdo. Resumon oni trovas ĉi sube. Impone sonis post tio la himno tra la salonego.

FESTPAROLADO

DE PROF. D-ro IVO LAPENNA
(Resumo)

Komence de sia parolado Prof. Lapenna akcentis la signifon de la atmosfero de la kongresa urbo por la sukcesa evoluo de la laboroj de la Kongreso. Laŭ lia opinio malofte unu kongresa urbo posedis en tiel alta grado tiom da trajtoj komunaj al la celoj kaj, parte, realigoj de la Esperantismo, kiel precize Mainz. Ĝin ornamas glora kaj malnova Universitato; laŭ sia geografia pozicio ĝi povas senti la pulsadon de la koro de Eŭropo, nuntempe strebanta al pli forta integriĝo; Mainz suferis pro la milito, kaj tial ĝi des pli aprezas la pacon. Fine, tiu ĉi urbo donis al la mondo plurajn eminentajn filojn, el kiuj Gutenberg certe estas la plej konata.

El la vidpunkto de la Kongreso mem tre grandan signifon havas la fakto, ke ĝia urbestro S-ro Franz Stein ne nur parolas la Internacian Lingvon, ne nur rekte kaj originale en tiu lingvo direktis siajn salutvortojn al la Kongreso, sed ankaŭ estas prezidanto de la L.K.K. kaj efektive gvidis ĝiajn laborojn. En la historio de niaj Kongresoj tio okazis por la unua fojo. Venos baldaŭ la tempo, kiam lia ekzemplo estos imitata de la aliaj urbestroj — kaj ne nur urbestroj — tra la mondo.

Tamen, ne pro tio li famiĝis tra Eŭropo kaj certe ne pro tio li iam eniros en la liston de eminentaj Mainz-anoj. Lia granda merito estas la enketo pri la lingva problemo en Eŭropo, kies iniciatinto, organizinto kaj efektiviganto li estas. Demandfolioj jam estas senditaj al centoj da urbestroj de la landoj apartenantaj al la Eŭropa Konsilantaro kaj ĉiutage alvenas respondoj. La rezultoj jam estas kuraĝigaj. La enketo en ĉiu okazo donos klaran bildon pri la opinio kaj starpunkto de centoj da urbestroj koncerne la lingvan problemon en Eŭropo kaj pri la solvo, kiun prezentas la Internacia Lingvo. Tre verŝajne tiu ĉi enketo, kune kun la iama peticio al U.N.O., kun la fama rezolucio de UNESKO, kun la iamaj klopodoj ĉe la Ligo de Nacioj, kiujn brile gvidis Prof. Privat, estos la ĉefaj elementoj, per kiuj, en konvena momento, estos kondukata la granda ofensivo por la enkonduko de la Internacia Lingvo en la lernejojn.

Rilate tiujn klopodojn en Eŭropo, la oratoro donis mallongan precizigon. Li diris :

"Zamenhof esprimis la opinion, ke la lingvo, iniciatita de li povus servi ankaŭ kiel paciga lingvo en plurnaciaj regnoj, en kiuj diversaj popoloj luktas inter si por la prestiĝo de siaj lingvoj. Tiu penso, kvankam justa, ne trovis ĝis nun eĥon interne de la plurnaciaj ŝtatoj. Tie la

afero provizore solviĝis aŭ tiel, ke la plej potenca nacio altrudis sian lingvon al la aliaj — malpli fortaj nombre kaj kulture — aŭ ke oni akceptis, kiel oficialajn kaj formale egalrajtajn, ĉiujn naciajn lingvojn, ekzemple en Svislando."

"Restante ĉe la principa pozicio de Zamenhof koncerne la rolon de la Internacia Lingvo ankaŭ sur teritorioj malpli larĝaj, ni, kompreneble, ne nur aprobas la ideon ke la Internacia Lingvo estu uzata kiel komuna neŭtrala komunikilo inter kelkaj aŭ ĉiuj popoloj de Eŭropo, sed, eĉ pli, ni tute ne vidas la eblecon de kiu ajn pli forta integriĝo sur la malnova kontinento sen la utiligo de Esperanto kiel komuna supernacia lingvo. Alia solvo ne ekzistas, ĉar Eŭropo konsistas ne el triboj aŭ el novaj popoloj jus elirintaj el la triba aŭ genta socia organizo, sed el multaj tre malnovaj nacioj kun grandaj kaj brilaj tradicioj, kun alte evoluintaj naciaj lingvoj, en kiuj — en ĉiu el ili — estas kreitaj kaj kreiĝas imponaj kulturaj valoroj. Ni aŭdis hodiaŭ matene la reprezentanton de la norvega registaro, kiu prave parolis al ni en la norvega lingvo. La norvega nacio estas malgranda, sed ĝi povas juste fieri pri sia kontribuo al la kulturo de la mondo. En la norvega lingvo estas skribitaj gravaj verkoj de la monda literaturo. Kial do la reprezentanto de tiu nacio devus uzi fremdan nacian lingvon parolante en internacia kongreso? Se li scius Esperanton, certe ni estus ankoraŭ pli feliĉaj aŭdi liajn vortojn en tiu lingvo, sed, se li ne scias la Internacian Lingvon, kio pli normala ol paroli en sia propra nacia lingvo anstataŭ balbuti aŭ eĉ flue paroli en fremda? Li agis prave kaj same prave agis la reprezentanto de la pola registaro, kiam li alparolis nin en sia nacia lingvo."

"Al tia kultura-politika situacio ne estas aplikebla la falsa teorio pri la pli aĝa, granda frato, nek estas imitebla la svisa modelo pro la tro granda nombro da lingvoj. Same tiel ne estas akceptebla la tiel nomata angla-franca dulingvismo, kiu — se ĝi entute estus realigebla — signifus formale superregon de du lingvoj malavantaĝe por ĉiuj aliaj, dum fakte temus tute simple pri superrego de unu sola nacia lingvo, ĉar la alia, la malpli forta, en tiu ĉi okazo la franca, devus cedi sian lokon al la pli forta. Tial, jes dulingvismo, sed nek angla-franca, nek germana-itala, nek sveda-turka, nek kiu ajn alia kombino de du naciaj lingvoj, sed kombino sole justa kaj realisma: ĉiu nacia lingvo kaj la Internacia."

"La pledo por vasta enkonduko de Esperanto en la rilatojn de la eŭropaj landoj estas korekta kaj konforma al la bezonoj de Eŭropo. Sed estus grandega eraro kredi aŭ kredigi al kiu ajn, ke pro tio Esperanto estas aŭ devus fariĝi eŭropa lingvo. Ĝi sendube estas eŭropa, sed ĝi estas same tiel azia kaj afrika kaj amerika, ĉar ĝi estas monda, tuthomara. Tia ĝi estas — necesas ankoraŭfoje ĝin diri — laŭ la intenco de la genia aŭtoro, kies centjaran datrevenon de la naskiĝo la mondo festos en 1959; laŭ sia celo: servi kiel internacia komunikilo, ne forigante la naciajn lingvojn, en mondaj kadroj; laŭ sia interna strukturo, ĉar se pro kelkaj aspektoj ĝi estas pli proksima al diversaj eŭropaj lingvoj, laŭ aliaj aspektoj ĝi estas tre familiara al la lingvoj de aliaj kontinentoj. Fine kaj ĉefe, ĝi estas monde — ne eŭrope aŭ azie aŭ afrike — sed monde internacia laŭ sia socia portanto, nome laŭ tiu grupo de personoj, kiu utiligas ĝin por ĉiaspecaj internaciaj rilatoj, kiu evoluigas kaj riĉigas ĝin, mallonge, kies spirita proprieto ĝi estas."

Prof. Lapenna klarigis, ke pro la fakto ke ĉiu partoprenanto de niaj kongresoj mem pagas siajn vojaĝkostojn, tute kompreneble plej multnombraj estas la kongresanoj el la landoj plej proksimaj al la kongresa urbo. Des pli oni devas aprezi la ĉeeston de reprezentantoj el Japanujo, Hindujo, Usono, Suda Ameriko, Afriko, Aŭstralio, Novzelando, regionoj tre malproksimaj. Ili reprezentas milojn da personoj parolantaj la Internacian Lingvon.

"Ni ne forgesu — diris la oratoro — ke Brazilo estas la lando, en kiu la Esperanto-movado estas la plej forta nombre kaj multrilate ankaŭ kvalite. Ni neniam forgesu, ke grandparte dank'al eminenta karaktero de la urugvaja Esperanto-movado ni atingis la rekonon de UNESKO. Ni ankaŭ ne forgesu, ke estis precize la delegacio de Meksikio, kiu proponis la konatan rezolucion de UNESKO. Ni memoru, ke multaj japanaj sciencistoj riĉigis la esperantlingvan sciencan literaturon. Kaj Brazilo, Urugvajo, Meksikio, Japanujo ne estas en Eŭropo! Male, Danlando estas en Eŭropo! Ni ĉiuj bone konsciu, ke Esperanto estas disvastiĝinta sur ĉiuj kontinentoj, ke ĝi estas samrajte kaj egale posedata de ĉiuj personoj, kiuj ĝin parolas, tute egale en kiu parto de la terglobo ili vivas, ke ĝia socia portanto, do, estas kolektivo monde internacia."

"Mi certas, ke mi esprimas la opinion de la tuta kongreso, se mi petas la reprezentantojn de la landoj de Azio, Afriko, Aŭstralio, Ameriko kunporti al siaj hejmoj kaj komuniki al siaj landoj la firman starpunkton de tiu ĉi kongreso, ke la klopodoj kaj sukcesoj en unu lando aŭ sur unu kontinento neniel senigas la Internacian Lingvon de ĝia tutmonda karaktero, sed nur plifortigas ĝiajn poziciojn ankaŭ en aliaj landoj aŭ sur aliaj kontinentoj. Tial la nunaj klopodoj en Eŭropo estu varme salutataj ne nur en la okcidenta Eŭropo, sed ankaŭ en la tuta cetera mondo, same tiel kiel morgaŭ speciala klopodo en Azio aŭ sur kiu ajn alia kontinento estos salutata en la tuta mondo kaj apogata de ĝi. Ĉar nia fina komuna celo ja estas kaj restas enkonduki la lingvon en ĉiujn internaciajn rilatojn en amplekso monda."

"Tiu monde internacia karaktero de Esperanto estas unu el la multaj ecoj, kiuj distingas ĝin de la diversaj projektoj, daŭre produktataj, pri kiuj la gazetaro faras de tempo al tempo iom da bruo kaj kreas per tio sufiĉe da konfuzo. La protagonisto de unu el tiuj projektoj — kaj mi emfazas la vorton projekto — akcentas, ke ĝi celas komprenigi la Okcidenton, ke ĝi estas tuj komprenebla, ke ĝi speciale taŭgas por la scienco."

"Unue, la vorto "okcidento" estas ĝenerale tre misuzata. Kie fakte komenciĝas okcidento kaj kie ĝi finiĝas; kie komenciĝas la oriento kaj kie ĝi finiĝas? Tiu limo ne ekzistas. En tiu ĉi kazo tute speciale entute ne temas pri tio, kio kun rezervoj povus esti nomata okcidento, sed nur pri 2-3 nacioj, kiujn malkorekte oni ĝeneraligas kaj proklamas "okcidento". Due, eĉ se temus pri la tuta okcidento — kaj tiu vorto, mi ripetas, povas esti uzata nur kun rezervoj — kaj eĉ se tiu projekto estus efektive lingva esprimo de la tuta okcidenta mondo — kaj krome taŭga el lingvistika vidpunkto, kio ĝi ne estas — ĝi estus arkaikiĝinta antaŭ sia naskiĝo, ĉar hodiaŭ ne temas pri kompreniĝo nur de la okcidento, nek pri nova formo de lingva imperiismo, ĉi-okaze ia kolektive okcidenta kontraŭ la cetera mondo, sed temas pri komprenigo de la tuta mondo, pri komprenigo de okcidento kaj oriento, sudo kaj nordo, sen ia ajn lingva prestiĝo por tiu aŭ alia nacio, aŭ grupo da nacioj. Krome, ne temas pri la ebleco kompreniĝi nur por la suproj, sed por ĉiuj homoj. En la lasta tempo oni multe skribis kaj parolis pri kunveno sur la plej alta nivelo. Ni ne parolos pri la neceso, utilo aŭ malutilo de tia kunveno, nek ni pritraktos la eblajn rezultojn, ĉar oni povus kompreni tion kiel kontraŭan al la principo de nia neŭtraleco. Sed kion ni diras, kaj diras ĝin tre firme kaj laŭte, estas la urĝa bezono de la homaro kompreniĝi sur la plej malalta nivelo, nome sur la nivelo de ordinaraj homoj kiel ni, kolektiĝintaj en tiu ĉi kongreso. Ni venkis la lingvajn barojn kaj ni kun fiero akcentas, ke en tiu ĉi kongreso partoprenas reprezentantoj el plej diversaj landoj kun tre malsamaj politikaj sistemoj. Malgraŭ tiu fakto ni povas amike diskuti gravajn kulturajn demandojn, kiuj interesas la mondon, kiel montras la programo."

"Trie, tiu vulgare reklamata "tuja kompreneble-co" estas nenio alia ol relativa kompreneble-co — ne parolebleco — por personoj, kiuj jam bone parolas 2-3 okcident-eŭropajn lingvojn. Sed, se estas jam tiel, kial tute simple ne preni unu solan okcident-eŭropan lingvon, iomete ŝanĝi ĝian ortografion, nomi tion "nova lingvo" kaj fiere emfazi, ke la popolo de tiu lingvo ĝin "bonege komprenas"? Multe pli simple kaj ankaŭ pli honeste!"

"Ĝuste pro la fundamentaj lingvistikaj eraroj de tiu projekto, malgraŭ la konsiderindaj financaj rimedoj malantaŭ ĝi, ĝi restis projekto, ne transformiĝis en vivantan lingvon kaj neniam transformiĝos, ĉar al ĝi, same kiel al ĉiuj aliaj, mankas la esenca elemento de lingvo: homgrupo, kies esprimo ĝi estus, kaj al kies komunikado ĝi servus."

INAŬGURO:
Dum la kantado de la Himno

"Ne povante trovi, kiuj ĝin parolus aŭ pretus ellerni, oni fine venis al 'genia' ideo paroligi roboton en la Brusela Ekspozicio. Kaj la ĉasantoj de sensacioj registris tiun epokfarantan faktonl Jen, vi premas butonon kaj vi ricevas respondon! Se la lingvo konsistus el elektronoj kaj butonoj, la afero estus tiamaniere facile solvita. Sed feliĉe lingvo estas organismo pli delikata ol la plej perfektaj maŝinoj. Ĝi estas esprimo de la homa socio; ĝi devas servi al komunikado de homoj, ne de robotoj! Kaj homoj havas cerbon kaj koron, intelekton kaj animon, ili sentas feliĉon kaj doloron, estas vipataj de pasioj. Ni lasu, ke la admirantoj de butonoj admiru robotojn; ni fieru pri la homo kaj admiru lin kaj lian tuthoman lingvon!"

"Oni kreas konfuzon asertante, ke tiu aŭ alia projekto devus servi nur por la celoj de la scienco. Kaj tuj eĉ tiaj absurdaj ideoj trovas ian eĥon dum kelka tempo. Kvazaŭ la problemo estus solvita, se oni havus tute specialan lingvon por la scienco, alian por la komerco, trian por la turismo, kvaran por la kolektantoj de poŝtmarkoj ktp. Kvazaŭ, se tio entute estus ebla en la nunaj kondiĉoj en la internaciaj kadroj, tio solvus la problemon. La Internacia Lingvo devas taŭgi kaj por la scienco kaj por la komerco, kaj kiel instrumento de arta esprimado kaj kiel ilo de komunikado en la ĉiutaga vivo. Tiujn kondiĉojn plenumas nur Esperanto kaj ankaŭ por tiu kaŭzo ĝi estas plena, kompleta lingvo en la vera senco de la vorto."

"Kial ni dediĉis kelkajn vortojn al tiu demando? Certe ne, ĉar tiuj projektoj meritas kian ajn seriozan konsideron. Ankaŭ ne tial, ĉar la nura fakto ke tiaj projektoj estas fabrikataj ĉiujare, kaŭzas objektive kaj sendube malhelpon al la pli

rapida disvastiĝo de la Internacia Lingvo. Mi tion faris por montri ankoraŭ pli reliefe, unuflanke, la grandegan diferencon inter teoria projekto sen socia bazo kaj vivanta lingvo kiel esprimo de internacia socia grupo, kaj, aliflanke, la grandiozan verkon jam efektivigitan en sep jardekoj de funkciado de Esperanto. La irita vojo, sur kiu la genia projekto transformiĝis en vivantan lingvon, estis absolute korekta. Sur tiu vojo ni devas daŭrigi nian marŝadon antaŭen per ĉiam pli grandaj paŝoj. La fakto, ke en la lastaj jaroj la Internacia Lingvo tre disvastiĝis inter la junularo de diversaj landoj, estas pli ol ĝojiga. Ankaŭ en tiu ĉi kongreso troviĝas multaj ĉarmaj, kleraj kaj inteligentaj gejunuloj. Kelkajn el ili ni eĉ aŭdis hodiaŭ matene. Espereble en la sekvantaj kongresoj ilia nombro estos ankoraŭ pli granda. Ili ĉiam pli kaj pli transprenadu la gvidadon de la movado kaj faru tion ankoraŭ pli bone ol faris tion la antaŭaj kaj nuna generacioj. La estonteco de la mondo apartenas al la junularo. La estonteco de la Esperantismo apartenas al la esperantista junularo !"

LA LABORO DE LA SEKCIOJ

La Unua Sekcio laboris lundon matene de la 10-a ĝis 13-a horo. La salono estis plenplena. Ĉirkaŭ 500 kongresanoj el 29 landoj ĉeestis. Prezidis Prof. D-ro Hideo Yagi el Japanujo. La ĉefraportanto estis Prof. D-ro Ivo Lapenna, nun en Britujo. Li unue prezentis la signifon de la granda projekto de UNESKO sub la titolo **"Reciproka aprezado de la okcidenta kaj orienta kulturaj valoroj"**. La raportanto klarigis, ke pri tiu demando okupiĝos UNESKO dum la sekvantaj ok jaroj kaj ke UEA, kiel organizaĵo en konsultaj rilatoj kun UNESKO, promesis sian kunlaboron. Tion ĝi faris des pli volonte, ĉar la celo de tiu granda projekto esence respondas al la celoj de la Esperanto-Movado.

Poste la raportanto prezentis la problemon kaj akcentis la rolon de la Internacia Lingvo. Konciza resumo de lia raporto aperis en la Kongresa Libro kaj ankaŭ en la organo de la Asocio.

La diskuto, en kiu partoprenis entute 16 personoj el diversaj landoj de Eŭropo, Azio, Afriko kaj aliaj regionoj, estis tre fruktodona, sed tamen montriĝis, ke en tiel mallonga tempo ne estos eble solvi ĉiujn demandojn, ligitajn al la temo, tute speciale ne tiujn, kiuj koncernas la kulturajn valorojn jam kreitajn en la Internacia Lingvo kaj la rolon de Esperanto kiel ponto-lingvo. Pluraj diskutantoj akcentis, ke estos necese fari dokumentaron pri ĉiuj tradukoj el la Internacia Lingvo al la naciaj kaj analizi la funkciadon de Esperanto kiel traduk-lingvo de la internaciaj kongresoj kaj konferencoj. S-ro Norman Smith sugestis, ke la Sekcio rekomendu al la Komitato de UEA la starigon de komisiono por plani kaj gvidi okjaran programon pri la interŝanĝo de kulturaj valoroj inter la Okcidento kaj la Oriento. Post mallonga diskuto tiu propono estis akceptita.

Surbaze de la enkonduka raporto kaj de la opinioj esprimitaj en la diskuto, la raportanto prezentis al la Sekcio jenan rezolucion :

"La Unua Sekcio de la 43-a Universala Kongreso de Esperanto, okazanta en Mainz de la 2-a ĝis la 9-a de aŭgusto 1958, en kiu partoprenas 2154 reprezentantoj el 39 landoj, pridiskutinte sub la prezido de Prof. D-ro Hideo Yagi, Japanujo, la raporton de Prof. D-ro Ivo Lapenna pri la granda projekto de UNESKO "Reciproka Aprezado de la Orienta kaj Okcidenta Kulturaj Valoroj" en ligo kun la rolo de la Internacia Lingvo, unuanime decidas :

1. Doni sian plenan apogon al UNESKO en la realigo de tiu granda projekto, kies celo estas vaste reciproke diskonigi la kulturajn valorojn de Oriento kaj Okcidento kaj tiel kontribui al pli bona kompreniĝo inter la popoloj kaj al la monda paco;
2. Atentigi ĉiujn UNESKO-instancojn pri la lingva diverseco kiel fundamenta obstaklo al plena realigo de la projekto kaj ĝenerale al efektiva disvastigo inter la popolamasoj de la mondo de la skribitaj kulturaj valoroj de ĉiuj popoloj ĉu en Oriento, ĉu en Okcidento;
3. Komisii la Centron de Esploro kaj Dokumentado de UEA prezenti al UNESKO koncizan raporton pri la rezultoj de la diskuto en la Sekcio kaj ellabori kiel eble plej baldaŭ dokumentaron pri la ĝisnuna utiligo de la Internacia Lingvo por la diskonigo kaj aprezado de la Orientaj kaj Okcidentaj kulturaj — precipe literaturaj — valoroj ĉu rekte, ĉu kiel ponto-lingvo, kaj pri la rolo, kiun ĝi havas por la realigo de la granda projekto de UNESKO.

La Sekcio plue rekomendas al la Komitato de UEA starigi komisionon por plani kaj gvidi okjaran programon pri la interŝanĝo de kulturaj valoroj inter la Okcidento kaj la Oriento. Tiu komisiono prezentu sian planon al UNESKO kaj petu subvencion por la realigo de la plano".

La Sekcio unuanime akceptis tiun rezolucion, kiu poste estis pritraktita en la lasta kunsido de la Komitato de UEA. La Komitato unuanime aprobis ĝian enhavon kaj elektis kiel membrojn de la komisiono, menciita en la rezolucio, S-rojn Norman Smith (Britujo), Jean Thierry (Francujo), Prof. D-ro Hideo Yagi (Japanujo) kaj Tibor Sekelj (Jugoslavio). Kiel sekretario de la komisiono funkcios S-ro Norman Smith. La komisiono laboros interkonsente kun la direktoro de CED.

Ankaŭ la *Dua Sekcio* **"La Lokaj Societoj — kerno de nia Movado"** elvokis grandan interesiĝon. Tiu ĉi sekcio havis du kunsidojn : la unua estis lundon, la 4-an de aŭgusto, posttagmeze, dum la dua okazis mardon posttagmeze. Ambaŭ kunvenoj estis bone vizititaj, sed precipe la unua, kiun partoprenis ĉ. 500 kongresanoj. S-ro Jan Strönne (Svedujo), kiu devis prezidi tiun Sekcion, ne povis partopreni la Kongreson, sed tamen ellaboris ampleksan raporton, kiu estis multobligita kaj disdonita al la ĉeestantoj.

La Sekcion prezidis S-ro H. W. Holmes, Vicprezidanto de UEA, dum S-ino Emilija Lapenna, Jugoslavio, funkciis kiel raportanto. Ŝi atentigis precipe pri la plej gravaj punktoj de la raporto, ekz. pri la Magnetofona Servo de UEA, kiun bonege organizis S-ro Eichholz el Kanado. Ŝi emfazis, ke interŝanĝo de sonbendoj povas multe riĉigi la societajn programojn.

En la diskuto partoprenis ges-roj Parker (Anglujo), Flores (Brazilo), Giloteaux (Francujo), Noll (Danlando), Moravec (Germanujo), Batakliev (Bulgarujo) kaj pluraj aliaj. Ĉar la diskuto ĉefe turniĝis ĉirkaŭ la propagando kaj la kursoj, intervenis Prof. I. Lapenna, kiu atentigis ke la Sekcio iom fuĝas de la ĉefa pritraktota punkto, nome la interna vivo de niaj societoj. Ĉiuj ja scias — li diris — ke la programoj plej ofte estas banalaj kaj seninteresaj, kio daŭre perdigas al la Movado milojn da esperantistoj. Li esprimis sian admiron pro la serioza laboro, kiun faris S-ro Strönne per sia raporto, sed li ne konsentas pri la punkto, kiu allasas la uzadon de la naciaj lingvoj en la laboro de la societoj : en ĉiu societo kaj en ĉiu Esperanto-organizaĵo oni devus uzi ĉiam nur la Internacian Lingvon. Responde al F-ino Noll, kiu pledis, ke ĉiu esperantisto estu samtempe propagandisto, Prof. Lapenna atentigis, ke tio estas nek ebla nek utila. La informado estas delikata afero kaj nur personoj, kiuj studis la problemon el pluraj vidpunktoj — ekz. psikologia, sociologia kaj aliaj — povas efike informadi pri la Internacia Lingvo kaj tiamaniere helpi ĝian pluan disvastiĝon. S-roj Thierry (Francujo), Dolapĉiev (Bulgarujo) kaj aliaj raportis pri la cirkonstancoj en siaj societoj. Estis sugestite instigi la eksterlandanojn ĉiam viziti la lokan grupon. Tiucele estus utile, se en la Jarlibro de UEA troviĝus listo de ĉiuj societoj kun iliaj adresoj, telefonnumeroj, tagoj kaj horoj de la kunvenoj.

Inter la du kunvenoj de la Dua Sekcio kunsidis la Estraro de UEA kaj ĝi akceptis la sugeston, ke en la Jarlibro de UEA por la jaro 1959 aperu la nomoj, adresoj, tagoj kaj horoj de la kunvenoj de ĉiuj societoj, sub aparta rubriko, laŭ la landoj kaj lokoj, sed tiel ke ĉiu societo pagos la efektivajn kostojn de presado.

Post plia diskuto de la demando en la dua kunveno de la Sekcio, ĝi akceptis jenan rezolucion :

"La Dua Sekcio de la 43-a Universala Kongreso de Esperanto en Mainz, post detala pridiskuto de la temo "La lokaj societoj — kerno de nia movado" konstatas ke la konsisto de la esperantistaj societoj estas tre malsama kaj ke ili laboras en tre diversaj cirkonstancoj. Tamen ekzistas elementaj kondiĉoj, kiujn ĉiuj societoj povas kaj devus apliki en sia laboro.

La Sekcio varme rekomendas : ke ĉiu esperantista socieo kaj grupo

1. nepre havu konstantan kunvenejon, estu eĉ kafejo;
2. organizu konstantajn regulajn kunvenojn kun programoj. (Vaste utiligi la magnetofonan servon de U.E.A. kaj radio-elsendojn.);
3. malfermu minimume unu kurson jare, ĉu en propra aŭ alia organizo;
4. trovu almenaŭ unu funkciulon, kiu konscience okupiĝos pri la administraj laboroj;
5. ĉiam dum la kunvenoj ĝis la maksimuma ebleco parolu nur Esperanton."

De kiam estas enkondukita la sistemo de Sekcioj por la pritrakto de la ĉefaj programpunktoj de U.K., la unuan fojon la kongresanoj montris efektive grandan interesiĝon pri ilia laboro. Neniam ĝis nun en la laboroj de la Sekcioj partoprenis tiel granda nombro da kongresanoj. Tio ŝuldiĝas certe ne nur al la fakto, ke ambaŭ temoj havis kaj havas eksterordinaran signifon por la Esperanto-Movado — tiu de la Unua Sekcio el vidpunkto ekstera, tiu de la Dua el vidpunkto interna — sed ankaŭ al la bonega antaŭpreparo de la laboroj. La raportanto de la Unua Sekcio dissendis jam plurajn monatojn antaŭ la Kongreso al ĉiuj Landaj kaj Fakaj Asocioj detalajn informojn pri la signifo de tiu granda projekto kaj aldonis resumon de la raporto, farota al la Sekcio. Siavice S-ro Strönne sendis specialan demandaron al la Landaj Asocioj kaj al pluraj grandaj, mezgrandaj kaj malgrandaj societoj. Surbaze de iliaj respondoj kaj de siaj grandaj spertoj kiel organizanto, li povis fari tre kompletan raporton kaj sugesti solvojn por plibonigo de la stato de la Esperanto-Societoj. Certe, la konkludoj de la Sekcio devas esti konsideratajn ne kiel fino de la diskuto en tiu afero, sed kiel komenco de plej serioza konsiderado de tiu fundamenta nuntempa problemo de nia Movado.

LA ĜENERALAJ KUNVENOJ DE U.E.A.

Ambaŭ kunsidoj okazis en salono Zamenhof kaj prezidis ilin la vicprezidanto de U.E.A., S-ro Harry Holmes O.B.E. En la unua kunsido, lundon je la 14-a h., salutis la Kongreson gravaj institucioj kaj organizaĵoj inter kiuj la Akademio de Esperanto, la Internacia Esperanto Muzeo en Wien, la junularsekcio de U.E.A. : T.E.J.O., la kristana organizaĵo K.E.L.I., la katolika unuiĝo I.K.U.E., la mondfederalista ligo U.L., la sciencista asocio I.S.A.E., la blindula organizaĵo, la mondpaca movado M.E.M., kaj la instruista, ĵurnalista, jurista fakorganizaĵoj, kiel ankaŭ Norda Prismo kaj la Brazila Kultura Kooperativo. Pluraj informis pri konsiderinda kresko de sia membraro en la lasta jaro. Salutis ankaŭ la Internacia Asocio de Popoluniversitatoj.

La prezidanto de L.K.K. de la 41-a U.K. en Kopenhago 1956, S-ro G. Kühlmann, solene transdonis la kompletan dokumentaron de tiu Kongreso bele aranĝitan en granda lede bindita libro. S-ro

Holmes transprenis ĝin kun danko por la arĥivo de U.E.A. kaj rekomendas al la nuna kaj estontaj L.K.K. fari similan dokumentaron.

La kunveno diskutis la 56-paĝan presitan Estraran Raporton pri la laboroj de U.E.A., kiun ĉiu kongresano ricevis en sia kongresa dokumentaro, post kelkaj aldonaj klarigoj kaj rimarkoj de la ĝenerala sekretario. Li atentigis pri la duobligo de la membronombro dum la lastaj 6 jaroj, akcentis la disvastigon de Esperanto en Hindujo en la kadro de la agado A.P.O. kaj apelaciis al plej serioza kunlaboro en la planoj por la proksima estonteco : festado kune kun U.N. de la 10-a datreveno de la publikigo de la Universala Deklaracio pri la Homaj Rajtoj, partopreno en la ankoraŭ 8-jara Unesko-kampanjo por reciproka aprezado de la orienta kaj okcidenta kulturaj valoroj kaj, antaŭ ĉio, la solena festado de la Zamenhof-jaro en 1959. En la diskuto dum kiu oni plurfoje deflankiĝis de la temo mem, partoprenis deko da ĉeestantoj.

En la Dua Ĝenerala Kunveno, kiu okazis vendredon, raportis Prof. D-ro I. Lapenna pri la laboroj de la Unua Sekcio kaj proklamis ĝian rezolucion. S-ino Emilija Lapenna raportis pri la laboroj de la Dua Sekcio. Post tio la fakaj kaj specialigitaj organizaĵoj kaj aliaj instancoj informis pri sia dumkongresa laboro. Oni aŭdis raportojn pri la Infankongreseto, pri la laboroj en la kunvenoj de la katolika, kristana, instruista, geografa, sciencista, kuracista, ŝaka, militrezistanta, studenta, arĥitekta organizaĵoj. Grava informo estis ke la internacia studenta ligo estis definitive fondita kaj ke ĝi aliĝis al I.S.A.E.

Jubilea Festprogramo de U.E.A. en la Festsalonego de la Kongresejo

La Jubilea Festprogramo okaze de la 50-jara Jubileo de la Fondiĝo de U.E.A. (1908-1958) estis enkadrigita per muzikaĵoj de la Trio : Koncertmajstro Hermann Kraus (violono), Koncertmajstro Willy Wunderlich (violonĉelo) kaj Orkestro-majstro Hans Hohner (fortepiano).

Sur la podiumo troviĝis i.a. S-roj Iranzo, Hispanujo, Barthel, Becker kaj Ritscher, Germanujo, Tyminsky, Sakowicz kaj Rudnicki, Pollando, Thollet, Maroko, Ingham, Britujo, iamaj delegitoj aŭ konsuloj el la plej frua tempo.

La Prezidanto de U.E.A., Prof. D-ro Canuto, inaŭguris la solenaĵon menciante, ke oni devas kelkfoje ankaŭ ripozi dum grimpado supren kaj malantaŭen rigardi. Li menciis kelkajn el la plej malnovaj pioniroj de la movado, Prof. D-ron Privat, Kortegan Konsiliston Hugo Steiner, S-ron Hans Jakob kaj aliajn meritoplenajn samideanojn el diversaj landoj. Prof. Canuto precipe akcentis, ke U.E.A. reprezentas la Esperanto-Movado eksteren. Iam oni distingis esperantanojn kaj esperantistojn; nun ekzistas nur esperantistoj, kiuj havas la saman idealon en la koro. Ja, la idealo estas en la koro, en la servoj, sed ni devas marŝi per niaj piedoj sur la tero kiel unu tuto. Ni devas antaŭ ĉio nin unuigi.

Post muzika interludo ekparolis Prof. Privat pri la fondiĝo kaj unua epoko de U.E.A. Li dankis al la grimpantoj en la nomo de la grimpintoj. Li dankis profunde al Prof. Canuto kaj al Prof. Lapenna, ke ili prenis sur siajn ŝultrojn la ŝarĝon de la U.E.A.-laboro. Li ankaŭ kore dankis al F-ino Vermaas pro ŝia ĉiutaga laboro en la Centra Oficejo.

Prof. Privat diris, ke la unua generacio de la Esperanto-Movado jam mortis, la dua estas reprezentata de la veteranoj sur la podiumo, la trian reprezentas la plejmulto de la ĉeestantaro kaj la kvara estas la juna generacio. En la dua generacio elstaras tiu bona junulo *Hector Hodler*. Li estis la filo de la famekonata pentristo Ferdinand Hodler, kiu eble estis la plej grava svisa pentristo post Holbein. Kiel gimnaziano Hodler eklernis Esperanton.

En la jaro 1905 li partoprenis la Bulonjan Kongreson. Kaŭze de la mizera vivo kaj la malordigitaj familiaj cirkonstancoj, en kiuj Hodler devis vivi, li estis maldolĉa en sia koro kaj absolute skeptika. Li havis ofte sarkasman opinion pri la eminentuloj. En la jaro 1907, post la plensukcesa Ĝeneva Kongreso, oni klopodis trudi al la esperantistoj novan projekton : Ido ! Oni devis timi disfalon de la movado. En 1908 Hodler finfine fondis U.E.A. kun du celoj : Unue krei reton de delegitoj, due disvastigi Esperanton. Komence oni proponis nomi tiujn reprezentantojn de Esperanto en la tuta mondo konsuloj, sed oni forlasis tiun ideon pro la argumento, ke ja nur ŝtatoj rajtas nomi konsulojn.

En 1908, dum la Dresdena Kongreso, D-ro Zamenhof mem partoprenis la kunsidon de la ĵus fondita U.E.A. kaj diris, ke U.E.A. reprezentas jam nun la esperantistaron entute. En 1912, Hodler, kiu ĉiam havis specialan flaron por la bonkvalito de homoj kunlaboremaj, korespondis kun juna Heidelberga studento, kiu venis poste al Ĝenevo, por transpreni la ĝeneralan sekretariejon de U.E.A. por longa tempo. Tiel oni gajnis la kunlaboron de S-ro Stettler. Tiuj homoj organizis dum la unua mondmilito eminentan servon de homa helpo. Pli ol mil leteroj estis per tio peritaj jam en 1915. Post la fino de la milito Hodler kreis sian projekton de mondregistaro, kiu estis nek

La Kongreso celebras la 50-jaran jubileon de UNIVERSALA ESPERANTO - ASOCIO

publikigita nek realigita. Post kelkaj jaroj de tre feliĉa edzeco li bedaŭrinde mortis tro frue.

Post la parolado de Prof. Privat ekparolis S-ro Hans Jakob, kiu rimarkis komence, ke en la jaro 1933 dum la 25-a Jubilea Kongreso en Kolonjo oni festis ankaŭ la 25-jaran jubileon de U.E.A. S-ro Jakob honoris la laboron de la malnovaj delegitoj, precipe la 50-jaran delegitecon de S-ro Barthel en Frankfurto. Li honoris la memoron de Generalo Sébert, kiu tiel energie kaj favore subtenis la klopodojn de U.E.A. La parolanto rakontis, ke li konatiĝis kun Prof. Lapenna antaŭ 25 jaroj en Jugoslavio. Memkompreneble iu, kiu laboras, estos atakata. Sed S-ro Jakob akcentis la plenan harmonion kun Prof. Lapenna kaj dankis al li kun manpremo.

Poste parolis S-ro H. W. Holmes, Vicprezidanto de U.E.A., pri "Kio estas U.E.A. hodiaŭ". Nenie en la mondo ekzistas tia organizaĵo kun tiaj diversaj interesoj sub unu tegmento. Nun ni havas: U.E.A., la Landajn Asociojn, la Fakajn Ligojn, la Delegitojn kaj la Individuajn Membrojn. Sed ni ankaŭ havas misiistojn por aliaj landoj. Unu el ili estas nun inter ni : S-ro Tibor Sekelj. Ni havas la Ĉe-instruistojn. S-ro Holmes parolis plue pri la nuntempa agado de U.E.A. de interna kaj ekstera flanko. Rilate al la interna flanko li insiste apelaciis al kunlaboro laŭ ekzakta laborplano, por atingi la celon. Rilate al la ekstera flanko, li menciis la konsultajn rilatojn kun Unesko, kio ne devas esti nura nova devizo, sed interna kunlaboro kun Unesko kaj la celoj de tiu ĉi mondvasta organizaĵo. Pri neŭtraleco la parolanto difinis la koncepton mem, kiu ne signifas, ke oni ne devas pledi por certa vidpunkto. U.E.A., li diris, estas vere demokrata organizaĵo, en kiu oni ne povas agi diktatore. Certe, la reto de delegitoj povus esti ankoraŭ pli vasta, sed ni estu tamen dankemaj jam por tio, kion ni jam atingis dank' al la penadoj de la pioniroj.

Post la parolado de S-ro Holmes la Prezidanto donis la parolon al S-ro Tibor Sekelj. Tiu rimarkis, ke en la nuna tempo la lingva haoso en Azio estas grandega. Dum la kolonia periodo oni parolis tie la lingvojn de la koloniestroj. Hodiaŭ ili volas vivi sian propran sendependan vivon. Ni povas proponi al ili lingvon pli logikan, facilan kaj rapide lerneblan. Tiu situacio estas ege favora por la propagando de Esperanto. Sed Azio estas ja trifoje pli granda ol Eŭropo, kaj oni bezonas tutan armeon da propagandistoj.

La finan paroladon faris Prof. Lapenna. En ĝi li donis kelkajn perspektivojn pri la estonta disvastiĝo de la lingvo kaj pri la rolo de U.E.A. kaj de ĉiuj ĝiaj konsistaj partoj por la rapidigo de tiu disvastiĝo. En la nuna momento oni ne povas fari diferencon inter la estonteco de la lingvo kaj la estonteco de U.E.A. Prof. Lapenna komparis la Internacian Lingvon al ĉaro, kiun oni devas puŝi al la montodorso, por ke, atinginte la supron, ĝi povu poste ruliĝi per si mem. Kiam ni atingos tion U.E.A. ne plu estos necesa. Sed por treni kaj puŝi la ĉaron al la pinto U.E.A. estas necesega, vere kondiĉo de sukceso. La plua progresado devas iri ĉefe laŭ du manieroj, absolute ne malatentante la aliajn, nome daŭre altigante la prestiĝon de la lingvo precipe riĉigante ĝin per nova kultura enhavo kaj utiligante la lingvon ĉiam pli vaste en fakaj medioj. Li apelaciis al ĉiuj subteni la laboron de la esperantista junularo, kiu formas la estontecon de U.E.A. kaj garantias la sukcesan daŭrigon de la laboro.

ZAMENHOF-JARO

Unu el la plej gravaj kunsidoj estis tiu de la Internacia Organiza Komitato por la festoj okaze de la centjara datreveno de la naskiĝo de Zamenhof. La kunsido okazis mardon la 5-an de aŭgusto sub la prezido de Prof. D-ro Ivo Lapenna.

La prezidanto mallonge prezentis la nunan staton de la preparlaboroj. Li diris, ke la IOK estas sufiĉe kompleta, ĉar en ĝi estas reprezentitaj multaj landoj el ĉiuj kontinentoj, sed tamen estos necese elekti ankoraŭ kelkajn membrojn de la IOK, precipe el landoj ankoraŭ ne reprezentitaj. Ankaŭ la Internacia Patrona Komitato, sub kies aŭspicioj okazos ĉiuj internaciaj aranĝoj, jam komencis formiĝi. La tasko de la kunveno estas kompletigi la IOK, elekti la Prezidantaron, doni pliajn direktivojn pri la personoj, pri la konsisto kaj karaktero de la Internacia Patrona Komitato kaj aprobi la definitivan programon de la aranĝoj.

En la diskuto partoprenis multaj membroj de la IOK. La kunveno sugestis kelkajn nomojn por la kompletigo de la IOK kaj komisiis la elektotan sekretarion peti ilian konsenton eniri en la IOK. La kunveno plue starigis firman principon, ke en la Internacia Patrona Komitato troviĝu nur la plej gravaj personoj de unuopaj landoj, ekz. prezidantoj de Respublikoj, ĉefministroj, ministroj (precipe pri eksterlandaj aferoj kaj pri edukado), Nobelpremiitoj, prezidantoj de sciencaj akademioj aŭ membroj de samrangaj institucioj, vere mondfamaj verkistoj kaj artistoj, nur plej altrangaj religiaj ĉefoj.

La kunveno elektis la prezidantaron de la IOK, kiu konsistas el prezidanto Prof. D-ro G. Canuto, 10 vicprezidantoj, sekretario kaj helpa sekretario. La adreso por korespondado de la IOK estos tiu de la sekretario, Prof. D-ro Ivo Lapenna, aŭ tiu de la helpa sekretario, S-ro N. R. Smith. La kompleta listo de la tiel plilarĝigita IOK kaj de ĝia prezidantaro estos publikigita en unu el la sekvantaj numeroj de "Esperanto".

La akceptita definitiva programo de la festoj entenas la disvastigon de la verko de Prof. Privat pri la vivo de Zamenhof kaj eventuale de aliaj biografiaj verkoj pri Zamenhof. La Centra Oficejo de UEA prizorgos eldonon de foto de Zamenhof en kelkaj formatoj, CED eldonos dum la tuta jaro 1959 specialajn dokumentojn pri Zamenhof kaj la Internacia Lingvo. Ĝi ankaŭ eldonos specialan dokumenton pri la vivo kaj verko de Zamenhof en Esperanto kaj en kiel eble plej multaj naciaj lingvoj en kunlaboro kun la Landaj Asocioj. CED same tiel liveros rekte al la mondaj presagentejoj kaj al siaj kunlaborantoj (por traduko en naciajn lingvojn) artikolojn pri Zamenhof, verkitajn de la plej elstaraj esperantistoj, precipe lingvistoj, de diversaj landoj. Se iel eble, fine de 1959 tiuj artikoloj kaj studoj aperos en formo de libro. La Informa Fako de UEA liveros dum la tuta jaro 1959 abundajn informojn pri Zamenhof kaj la lastjaraj progresoj de Esperanto. Estos farita speciala kampanjo en la radio kaj tiucele estos utiligataj precipe la Radio-stacioj, kiuj havas Esperanto-fakojn. Grandajn festojn aranĝos la LKK kun aprobo de la Estraro de UEA dum la Universala Kongreso de Esperanto en la Jubilea Jaro 1959 en Varsovio. La naciaj organoj de la Landaj Asocioj publikigu nacilingve specialan numeron pri la vivo kaj verko de Zamenhof en kiel eble plej multe da ekzempleroj kaj vaste distribuu ĝin. Ĉiuj Esperanto-Kongresoj — landaj, fakaj kaj specialaj — havu solenajn kunsidojn kun prelegoj, muzikaj punktoj, deklamadoj k.s., dediĉitajn al la aŭtoro de Esperanto (kiel modelo povus tre taŭge servi la UEA-Festo dum la Kongreso en Mainz). Ĉiuj lokaj societoj organizu la tagon mem de la datreveno altnivelajn publikajn aranĝojn, al kiuj estu invititaj ĵurnalistoj, reprezentantoj de la lokaj, provincaj aŭ ŝtataj kulturaj institucioj kaj edukaj instancoj. En ĉiuj landoj la Esperanto-organizaĵoj klopodu eldonigi jubileajn poŝtmarkojn. Ĉiuj festoj kaj aranĝoj — ĉu en lokaj, landaj, aŭ internacia kadroj estu vaste utiligataj por plia informado pere de la gazetaro, radio, ekspozicioj, afiŝoj, flugfolioj kaj aliaj rimedoj laŭ la landaj kaj lokaj cirkonstancoj, sed en ĉiu okazo ĉiam nur sur la plej alta nivelo. Laŭ la ebleco CED eldonos en 1959 kompletan bibliografion de ĉiuj verkoj en la Internacia Lingvo. Fine, la komitato aŭdis kun granda plezuro la informon de Inĝ. Rajski (Varsovio) ke grava pola filmkompanio produktos 30-minutan dokumentan filmon pri Zamenhof kaj la atingoj de la Internacia Lingvo. La komitato petas ĉiujn Esperanto-organizaĵojn, al kiuj la filmkompanio sin turnos por helpo, nepre tuj plenumi la peton, por ke la filmo povu esti kiel eble plej bona.

La Internacia Organiza Komitato unuanime akceptis deklaracion pri la Zamenhof-Jaro, kiu aperos en la decembra numero de "Esperanto". Estas ankaŭ akceptita jena

ALVOKO AL LA TUTMONDA ESPERANTISTARO

La Internacia Organiza Komitato por la Festoj okaze de la 100-jara datreveno de la Naskiĝo de Zamenhof aprobis dum sia kunsido de la 5-a de aŭgusto la definitivan programon por la aranĝoj en la Zamenhof-Jaro. La programo aŭtaŭvidas diversajn aktivecojn dum la tuta jaro kun la kulminaj punktoj en aŭgusto 1959 dum la U.K. en Varsovio kaj, speciale, la 15-an de decembro 1959.





faris ian de aŭ rekomendon, sed ĝi tre helpis al ĉiuj ntoj pli bone kompreni la jurajn sistemojn de diversaj landoj koncerne la prıncıpon de preslibereco, konstitucie garantiita kaj formale rekonita en la Universala Deklaracio unuflanke, kaj la realigo de tiu principo en la praktiko, aliflanke. Ankaŭ tiu ĉi kunveno kontentige sukcesis, precipe se oni konsideras ke ĝi estis la unua tiaspeca kunveno, kiun organizis I.A.J.E. La kunveno decidis, ke dum la kongreso en Varsovio okazu simila kunveno inter la membroj de I.A.J.E. kaj la polaj juristoj-neesperantistoj kaj ke ĝi pritraktu la demandon de la pozicio de la advokato en diversaj landoj.

La du kunvenoj montris la grandan utilon de kontaktoj inter kongresanoj kaj samfakuloj neesperantistoj de la kongresa urbo aŭ eĉ lando. Estus tre bone, se la aliaj fakaj kaj specialaj Esperanto-organizaĵoj agus same en estontaj kongresoj.

DISERVOJ

Ekster la oficiala programo okazis la Diservoj. La Katolika Diservo estis en la Episkopa Katedralo de Mainz. Partoprenis ĉ 1000 personoj. Pastro Ludwig Thalmaier predikis en la Internacia Lingvo pri la temo "Dio kaj nia Atomepoko". Patro H. G. Wannemakers el Hago celebris la Sanktan Meson. Oni preĝis kaj kantis komune en la Internacia Lingvo.

La Protestanta Diservo okazis en la Christus-preĝejo, kie vikario Adolf Burkhardt predikis en la Internacia Lingvo. Lia teksto estis el la Agoj 17: 16-34. Partoprenis ĉ 600 personoj.

Post la Diservo la embroj de K.E.L.I. havis kunvenon kun la me broj-neesperantistoj de la komunumo de Mainz en aparta salonego de la preĝejo.

Parolis la Ĉefpastro de Rejnlando, S-ro Karl Trabandt, la Dekano de la Teologia Fakultato en Mainz, Prof. D-ro Walther Holsten kaj aliaj. Ankaŭ tiu ĉi kunveno estis tre sukcesa kaj apartenas al la kategorio de renkontiĝoj inter la kongresanoj kaj lokaj neesperantistoj de la sama fako, specialeco aŭ religio.

LA GERMANA FEDERACIA FERVOJO EN LA UNIVERSALA KONGRESO

Laŭ instigo de la Germana Esperanta Fervojista Asocıo la administracio de la Germana Federacia Fervojo instalis en la ĉefstacio de Mainz specialan akceptejon, en kiu deĵoris dumtage kaj fervojistoj donante la unuajn informojn kaj helpon al eksterlandaj gastoj, ĉion en Esperanto.

Plie, en la kongresejo estis informejo kun varbafiŝoj, modelo de transeŭroptrajno, aŭtomate moveblaj afiŝoj kaj kolorbildoj, horaroj, varbfolioj kaj faldprospektoj. Tie seninterrompe deĵoris 2-3 fervojistoj en uniformo por doni informojn kaj plenumi petojn pri rezervigo de sidlokoj k.t.p.

Dum la ekskursa tago ĉiuj deĵorantoj akompanis la specialan trajnon al Heidelberg kaj Michelstadt survoje helpante kaj konsilante la esperantistajn pasaĝerojn.

La Germana Federacia Fervojo oficiale delegis kaj pagis la 6 deĵorantojn dum la kongressemajno. Ili portis sur la maldekstra maniko orkoloran rubandon kun surskribo "Esperanto".

MAINZ-ANOJ!

De la 2-a ĝis la 9-a de Aŭgusto 1958 Mainz gastigas la 43-an Universalan Kongreson de Esperanto, kiu kunvenigas pli ol 2000 esperantistojn el la tuta mondo.

La ideo de internacia lingvo, en kiu troviĝu elementoj el ĉiuj vivantaj lingvoj, meritas la atenton de ĉiu homo interesita pri paco kaj interpopola kompreniĝo. Esperanto estas la lingva tribuno, sur kiu ĉiuj nacioj povas egalrajte renkontiĝi kaj pace roli. La intereso, kiun UNESKO montras al Esperanto, substrekas ĝian gravan kunligan rolon, ĉar la ınternacia lingvo Esperanto plifaciligas la interrilatojn de la homoj de ĉiuj nacioj kaj rasoj.

Konsiderante la altan idealon, kiu animigas ĉiujn partoprenantojn, mi deziras al la Kongreso plenan sukceson. Ĉiujn Mainz-anojn mi ınvıtas kontribui por ke gastoj ĉiulandaj kunprenu favoran impreson pri la restado en nia urbo. Elradiante novan ımpulson por la interkompreniĝo kaj la paco, la 43-a Universala Kongreso de Esperanto plenumas altan mision. Ni Maınz-anoj estas tre fieraj, ke nia urbo povas kunhelpi al tiu celo.

Franz Stein
Ĉefurbestro

Bonvensaluto : *En la stratoj de Mainz grandaj afiŝoj en la germana kaj Esperanta lingvoj salutis la kongresanojn kaj atentigis la Mainz-anojn pri la kongreso per supra teksto.*

LA KONGRESEJO

Malofte iu Kongresejo estis tiel taŭga por la celo kiel estas la Palaco de la Elektantaj Princoj en Mainz, kiu jam de malproksime montris la vojon al la alvenantaj kongresanoj p siaj multaj lokaj, naciaj kaj esperantaj flagoj, kiel ankaŭ per sia bela vespera ilumino. Preskaŭ ĉiuj ĝoj povis okazi en tiu ĉi belega malnova sed oportune modernigita konstruaĵo. La akceptejo facile donis

lokon al ĉiuj giĉetoj, la kunsidoj okazis en komfortaj salonoj kaj taŭga restoracio netakseble servis speciale al tiuj kongresanoj kiuj devis en granda urĝo manĝi inter du kunsidoj.

LA URBO MAINZ AKCEPTIS LA KONGRESANARON

En varma posttagmezo la kongresanoj estis akceptitaj en la kortego de la Kongresejo. La urbestro, s-ro Stein, kore bonvenigis la ĉeestantojn, kaj la prezidanto de U.E.A., prof. d-ro Canuto, dankis al la urbo Mainz, speciale al la prezidanto de LKK, la urbestro de Mainz, s-ro Stein. — La ĉeestantoj estis regalataj per kolbasoj, bulkoj kaj vino.

La balkono, de kie parolis la urbestro S-ro Fr. Stein kaj la prezidanto de U.E.A. Prof. G. Canuto.

EKSKURSOJ

Ĵaŭdo estis la tago de ekskursoj, tri entute. Ekskurso A: Al la fabela romantika Rejno, ekskurso B: Al Heidelberg, kaj ekskurso C: Al Frankfurt — la naskiĝurbo de Goethe.

LA INFANA KONGRESETO

La organizinto de la Infana Kongreseto, S-ro Willi Brandenburg, jene raportas pri la aranĝo:

"Kiam sabatmatene la infanoj estis demandataj, ĉu plaĉis al ili la Kongreseto, ili unuanime kun sincera bedaŭro pro la jam alveninta adiaŭa horo konstatis, ke unu semajno vere estas tro mallonga. El tiu esprimo de kontento oni eble povas konkludi, ke malgraŭ obstakloj la Tria Internacia Infana Kongreseto sukcesis atingi sian celon. Ĝi estis vera miniatura Universala Kongreso kun konformaj bazo kaj organizo adaptitaj al la infana medio. Gazetaj kaj radiostaciaj raportoj ĝin prave nomis unika en la mondo.

La Kongreseto arigis 30 infanojn el naŭ landoj. Laŭ lingva vidpunkto oni povis facile diferencigi tri grupojn. Bonegan lingvoscion, fluan parolon kaj laŭ la aĝo konsiderindan vortprovizon oni trovis ĉe tiu dekkvino da geknaboj, kiuj en sia familio kutimas aŭdi kaj paroli la lingvon. Ankaŭ tiuj infanoj, kiuj nur en kurso aŭ lernejo havis okazon akiri kaj apliki sian lingvoscion, ĝenerale modele klopodis kontribui al amikeca atmosfero kaj fervore eluzis la ŝancon praktikante plivastigi siajn lingvokonojn. Bedaŭrinda estis malgranda grupeto de infanoj, kies gepatroj aŭ instruistoj ne komprenis, ke partopreno sen almenaŭ fundamenta lingvoscio ne nur ekskluzivas la deziratan interkontakton, sed ankaŭ malfeliĉigas la infanojn mem.

La grupoj estis kunigitaj laŭ aĝoj kaj miksitaj laŭ nacieco kaj estis gvidataj de la "kongresgepatroj". Ankaŭ la gvidantoj de la kvar kongresfamilioj venis el kvar diversaj landoj. Danke menciinda estas la aktiva kunlaboro de la Internacia Ludoĉambro en Kopenhago. En la antaŭe fiksita programo restis sufiĉe da loko por ludoj, kantoj, slojdo kaj improvizitaj surprizoj de la infanoj mem. Jam vendrede infanoj akceptis siajn geamiketojn ĉe la stacidomo. La ĉarmaj blankaj maristaj ĉapoj ĉie en la publiko vekis atenton, dum promenadoj tra la urbo, al birdejo, akvariejo kaj dum ekskursoj al Frankfurt, Rüdesheim kaj Bingen.

Tre interesis la infanojn la aviadejo de Frankfurt, kie ili havis okazon rigardi usonajn aeroplanojn. Sed ankaŭ la vidindaĵojn de la urbo Frankfurt ili admiris. Kulmino de la ŝipekskurso al Rüdesheim-Bingen estis la vojaĝo per pendvagonetoj monten kaj valen. La turisma urbo Bingen oficiale akceptis la Kongreseton, pri kio la lokaj gazetoj favore raportis. Tre grandan plezuron faris al la kongresetanoj la gajiga prezento de la konata aktoro Alexander Starke, kiu prezentis amuzajn rakontojn kaj kantojn. Koloraj lumbildoj memorigis pri la 1-a kaj 2-a Infanaj Kongresetoj kaj aliaj bildoj invitis al vojaĝo tra historio kaj pejzaĝo de la kongreslando. Aparta filmprezentado estis aranĝita por la infanoj.

Kun granda fervoro la etuloj preparis la vizitotagon, en kiu ĉ. 250 kongresanoj, pedagogoj, ĵurnalistoj kaj radioraportistoj gastis en la kongresejo de la infanoj. La tramoj al la Feria Hejmo estis tiel plenaj, ke multaj personoj devis rezigni pri la vizito. Ĉiu vizitanto havis okazon kontakti kun la infanoj, kiuj servis en la bazareto, ludis kaj kantis. Kiel specialan surprizon ili prezentis sur la subĉiela scenejo parton el la fabelo Neĝulino, en kiu rolis infanoj el ĉiuj reprezentitaj nacioj, kaj por kiu ili rikoltis multan aplaŭdon. La parolado de Rev. F. Moravec pri "Hejma lingvo Esperanto en Infana Kongreseto" trovis notindan eĥon kaj ĝojigan aklamon. S-ano Edgar Perseke kun sia pupteatro kaptis la korojn de junaj kaj maljunaj ĉeestantoj. La etuloj entuziasme travivis la aventurojn de la heroo Kaspreto, en la sorĉa komedio originale verkita por la Kongreseto.

Adiaŭa balo kun ekscita iluminacio en la nokte malhela parko, muziko kaj danco finis la semajnon. La infanoj en belaj folkloraj kostumoj, memfaritaj kun multe da fantazio kaj talento, ricevis memorajn donacetojn. En solena akto ĉiu estis nomata membro de la Tergloba Klubo, kies centro estas la Internacia Ludoĉambro. Tre bele la infanoj ornamis sian kongresejon per memverkitaj desegnaĵoj, per blazonoj, bildoj kaj fotoj el la loĝlokoj de la partoprenantoj. Sur granda Eŭropa mapo ĉiu infano signis sian urbon per flageto. La kongresetejo estis paca insulo de niaj infanoj el Svedujo, Danlando, Britujo, Finnlando, Francujo, Nederlando, Jugoslavio, Svislando kaj Germanujo."

LA KONGRESA LIBRO

Kiel kutime ĝi akompanis la kongresanojn dum la tuta semajno. Ĝi enhavis amason da utilaj kaj interesaj informoj. Praktika estis denove la programaj paĝoj en alia koloro, tiel ke oni tuj trovas ilin. Pluraj bildoj kaj multaj reklamoj pli vivligas la aspekton. Sendube en venontaj jaroj oni klopodos ĝis ekstremo eviti preserarojn.

LA INTERKONA VESPERO

Ĝi okazis en multaj salonoj de la Kongresejo kaj estis vere interkona. Oni povis iri de tablo al tablo por serĉi novajn kaj malnovajn gekonatojn, oni povis manĝi kaj trinki kaj ne estis ĝenata de krianta muziko dum siaj konversacioj

BANKEDO KAJ KONGRESA BALO

En la du plej grandaj salonegoj de la Kongresejo okazis la balo post festbankedo honore al UEA, en kiu partoprenis 360 kongresanoj. Ambaŭ aranĝoj brile sukcesis.

GAZETARA SERVO

Ankaŭ ĉijare la Kongresa Gazetara Servo silente plenumis ampleksan laboron. La *esperantista branĉo,* gvidata de S-ro Richard Reuchlin, vicprezidanto de TEJO kaj prezidanto de Germana Esperanto-Junularo, eldonis dum la Kongreso 5 esperantlingvajn bultenojn, kun amplekso de 18 paĝoj, kaj kvinpaĝan suplementon. La eldonkvanto estis de po 300 ekzempleroj, je dispono de la esperantistaj gazetaro, radio-stacioj kaj ĵurnalistaro.

La *germana branĉo,* sub la estrado de S-ro Lothar Weeser-Krell, membro de la Loka Kongresa Komitato, aperigis dum la Kongreso 7 germanlingvajn informilojn, entute 18 paĝoj, kun eldonkvanto de po 700 ekzempleroj. Nur dum la Kongreso 12.600 folioj estis disdonitaj al la germana kaj eksterlanda gazetaro, al telegrafagentejoj, radio-stacioj, kino-kaj televidaktualaĵoj. 33 lokaj kunlaborantoj de la Kongresa Gazetara Servo regule ricevis la bultenojn.

19 eksterlandaj novaĵagentejoj kaj 38 eksterlandaj gazetoj kaj revuoj kun monda graveco same ricevis la tagajn komunikojn, zorge de la *internacia branĉo,* kies gvidanto estis S-ro Willi Bengard. Tiu branĉo, krome, eldonis en Esperanto serion de 10 artikoloj, kiujn la kongresanoj povis libere ricevi kaj sendi al sialandaj gazetoj en nacilingva traduko.

La rezultoj de la kongresa informado estas akurate kontrolataj pere de profesia oficejo pri gazetartikoloj, kiu ĝis nun eltondis centojn da artikoloj kaj mencioj. La kontaktojn kun la Radio gvidis S-ro Bernhard Zenker: pluraj radiodissendoj pri la Kongreso okazis en loka, regiona kaj tutlanda kadro. La Kongreso estis dufoje televidita: unu el la programoj temis pri sceno el "Reaperantoj" de Ibsen en Esperanto. La internacia Kinokompanio, Fox-Movietone, filmis la Kongreson.

Estas menciinde, ke la Kongresa Gazetara Servo konstante dum la tuta jaro provizis la informadan mondon per periodaj komunikoj. Ĝi organizis tri gazetarajn konferencojn: du fine de aprilo en Bonn kaj en Mainz kaj unu en Mainz, antaŭ la komenco de la Kongreso, en ĉeesto de la Estraro de UEA.

La Gazetara Servo en Mainz, ĉefe la nacilingva branĉo, laboris kun fakaj metodoj, laŭ la principoj enkondukitaj de la Kongreso en Parizo kaj larĝe ampleksigitaj post la Kongreso en Bologna. Dank'al la subteno de la Loka Kongresa Komitato, ĝi estis la plej amplekse laboranta en la historio de niaj Universalaj Kongresoj.

JUNULA VESPERO

Salono "Grabowski", la dua laŭ grandeco en la tuta kongresejo, estis plenplena merkredon vespere, kiam okazis la Junula Vespero, speciale rezervita al la esperantistaj gejunuloj, kiuj en la nuna jaro rimarkinde multnombre partoprenis en la Universala Kongreso. Krom dancado, sub gvidado de bona orkestreto, okazis skeĉoj, improvizitaj humoraĵoj kaj ludoj, kiuj tre amuzigis la ĉeestantojn.

UNIVERSALA EKSPOZICIO

Anoncita per artaj afiŝoj tra la tuta urbo, la Universala Ekspozicio estis elmontrita la kvaran fojon en Mainz, kie ĝi trovis indan lokon en la salonoj de la Gutenberg-Muzeo. - Pri la ekspozicio ni detale raportos en la oktobra numero de ESPERANTO.

SOLENA FERMO

Kolektiĝis la kongresanaro por la lasta fojo en la granda salono Zamenhof. La ĉefurbestro de Mainz per bele elektitaj vortoj adiaŭis la Kongreson aldonante interesan proponon pri fondota senato de la Esperanto-Movado, kies tasko estus subteni internacian universitaton starigotan en bela kastelo proksime al Mainz. La propono estos studata, sed kia ajn estos la rezulto, estas ja tute certe ke neniam la Esperanto-Movado povos sufiĉe alte taksi la bonon kiun faris kaj faras al ĝi la urbestro de Mainz.

La Prezidanto de U.E.A., Prof. Canuto, dankis la urbestron kaj proklamis la Honoran Patronecon de Prof. D-ro Seiho Nishi, Japanujo kaj Prof. D-ro Maurice Fréchet, Francujo, kiel ankaŭ la nomigon de Prof. D-ro Ivo Lapenna kiel Honora Membro. Pri la ceteraj decidoj de la Komitato de U.E.A. informis la Ĝenerala Sekretario.

Prof. Waringhien publikigis la rezultojn de la Belartaj Konkursoj kaj disdonis la diplomojn. S-ro Poul Thorsen en la nomo de la eldonejo KOKO en Kopenhago informis ke kiel "Verkisto de la Jaro" estis elektita Marjorie Boulton. Ŝi ricevis la "Arĝentan Spronon" de KOKO. S-ro Günther Becker proklamis la rezultojn de la Oratora Konkurso kaj disdonis la diplomojn.

Prof. Lapenna, kiel sekretario de la Internacia Organiza Komitato por la Zamenhof-jaro raportis pri la decidoj de tiu Komitato kaj laŭtlegis alvokon al la tutmonda esperantistaro.

Post tio Prof. Canuto esprimis la dankon de la Estraro kaj de la tuta kongresanaro aparte al ĉiu membro de L.K.K. por la bonega kaj streĉa laboro kiun ĉiu el ili bonhumore faris. Antaŭ ĉio li tre kore dankis al la edzino de la urbestro kiu donis grandan personan helpon en la laboroj. Liajn dankvortojn akompanis bela florbukedo. Ne laste estis menciinda la Konstanta Kongresa Sekretario, S-ro G. C. Fighiera, kiu en ĉiu Kongresurbo devas zorgi pri la kontinueco en la Universalaj Kongresoj.

S-ro Fighiera siavice dankis la urbestron en la nomo de ĉiuj anoj de L.K.K. kaj transdonis al li ekzempleron de la kongresa insigno el oro.

Inĝ. Azzi, estrarano pri kulturaj aferoj, estis farinta rimportreton pri la urbestro — trovinĝanta aliloke en tiu ĉi numero — kiun deklamis Karlo Minnaja. Sub tondraj aplaŭdoj la urbestro dankis.

Sekvis la lasta solenaĵo, la oficiala invito al la 44-a Universala Kongreso en Varsovio, fare de la reprezentanto de la pola registaro, deputito Lucjan Motyka, prezidanto de la Kultura Komitato de la pola parlamento. Inĝ. A. Rajski, prezidanto de L.K.K.-Varsovio transprenis la grandan kongresan flagon el la manoj de la Prezidanto de U.E.A. Sonis la himno tra la salono. La Kongreso estis finita.

PROJEKTO DE FILMO pri „ZAMENHOF kaj lia VERKO"

okaze de centjara datreveno de lia naskiĝo.

Konsiderante la eblecojn kaj ŝancojn por realigo de tia projekto ni intencas krei dokumentaran filmon de 600 metroj (ĉ. 20-30 minutoj) helpe de la Ŝtata Pola Filmentrepreno "Wytwórnia Filmów Dokumentarnych" en Varsovio.

Tiu ĉi filmo estu destinita ne nur por la Esperantistaro sed precipe por la ne-Esperanta publiko.

La enhavo de la filmo estu :

1.) La historio de Esperanto. Pri la aŭtoro kaj lia ideo de Internacia Lingvo. La disvastiĝo de Esperanto tra la mondo. Literaturo, gazetaro, UEA ktp. La triumfo de Zamenhof. Kongresoj. Zamenhof sur la ekrano (filmo de Pathé farita en Parizo 1910). Stratoj nomataj honore al li kaj Esperanto. Monumentoj. Tombo en Varsovio. Militoj minacas la movadon.

2.) La nova ekfloro de la movado post la milito. La lingva ĥaoso en la mondo. La lingvaj malfacilaĵoj dum internaciaj kunvenoj. La komplikita sistemo de telefonaŭdiloj, kabinetoj de tradukistoj (materialo el arĥivo). Kiel kontrasto : Internaciaj Esperanto-kongresoj kun unu lingvo. Eldiroj, fragmentoj el paroladoj de diversnaciaj oficialaj personoj. Infana kongreseto. Balo kaj teatro. La belsoneco de Esperanto (kantoj, deklamoj). Somera Universitato. Esperanto-Muzeo en Vieno. Esperanto en la lernejojn ! Esperanto kaj Radio. UEA-Unesko.

Por tiu ĉi filmo **estos verkata speciala scenario,** kiu en arta formo kaj per interesaj scenoj demonstraciu la seriozecon de nia movado. Speciale oni akcentos la gravegan rolon, kiun Esperanto ludas en la alproksimigo de la diversaj nacioj, **en la batalo por la paco !**

La filmo, por kiu estos komponita speciala muziko, estos akompanata de komentario en Esperanta lingvo (por la Esperantistoj). La sama filmo estos eldonata en diverslingvaj variantoj kun komentario pola, angla, franca, germana ktp. kaj tiamaniere servos kiel bonega propagandilo al la kluboj okaze de propagandvesperoj, antaŭ kursoj, en lernejoj ktp. Samtempe ĝi povos esti ekspluatata per landaj film-distribuejoj en ĉiuj kinoteatroj.

Estas kompreneble, ke la filmon faros sub la direktado de nia verkisto kaj filmreĝisoro Jean Forge spertaj fakuloj, kiuj donos certan garantion pri la kvalito de tia dokumentara filmo. Ni atentigas ke la Pola Dokumentara Filmproduktejo akiris multajn premiojn en internaciaj filmfestivaloj.

Tamen — por efektivigi tian filmon — ni bezonas multan filmmaterialon el la Esperantista vivo. Tial ni turnas nin al ĉiuj Esperantaj organizaĵoj kaj unuopaj Esperantistoj kaj alvokas ilin je kunlaboro. Ĉiu kiu disponas pri pretaj filmbendoj oficialaj aŭ privataj ilustrantaj scenojn kaj fragmentojn de internaciaj aŭ landaj kongresoj de Esperanto, filmojn de Zamenhofaj monumentoj aŭ stratoj, de kunvenoj aŭ manifestacioj por Esperanto, de Esperantaj hejmoj, hoteloj, tendaroj, ekspozicioj, ekskursoj, ekspedicioj, Cseh-metodaj kursoj, radio-dissendoj ktp., bonvolu alsendi al ni sian materialon kun klariganta teksto. Samtempe ni alvokas la organizaĵojn kaj unuopajn Esperantistojn, kiuj estas pretaj realigi filmigadon de supre cititaj okazaĵoj, anonci al ni sian kunlaboron. Speciale interesas nin malproksimaj landoj kiel ekz. Ĉinujo, Japanujo, Brazilo, Aŭstralio, Nov-Zelando, k.a. La pretaj filmbendoj

povas esti normalaj aŭ mallarĝaj. Bonvolu indiki ĉu vi deziras resendon de via materialo aŭ ĉu vi estas preta donaci ĝin al la arĥivo de C.E.D. de U.E.A.

Ni esperas ke vi bone ekkomprenis la gravecon de nia projekto. La Pola Dokumentara Filmproduktejo en Varsovio povas realigi tian filmon nur sub la kondiĉo, ke la tutmonda Esperantistaro helpos. Venis jam la momento por ekparoli pri Esperanto kaj ĝia kreinto Zamenhof al milionoj da homoj pere de la plej potenca reklamilo, kia estas la filmekrano !

Loka Kongresa Komitato de la 44-a Universala Kongreso de Esperanto en Varsovio, strato Kozia 3.

LA PREMIO "COMELLA-BASSOLS"

Sekve de malavara gesto de la konata kataluna samideano, s-ro J. Comella (Vich, Hispanujo), oni anoncas la premion "Comella-Bassols." S-ro Comella disponigis la ŝatindan sumon de 2.000 hispanaj pesetoj kiel premion al

gaja rakonto en Esperanto.

La konkursaĵojn juĝos internacia komisiono, en kiu (laŭ la peto de s-ro Comella) partoprenos katalunaj membroj apud reprezentantoj de U.E.A. Kondiĉoj sekvas :

1. La konkursaĵoj estu en la longo de 2.000-3.000 vortoj. Ili ne estu antaŭe aperintaj en presformo. La premiita verko aperos en la revuo "Esperanto" kaj oni ne rajtas antaŭe aperigi ĝin en alia gazeto sen permeso de la redaktoro de tiu revuo. La kopirajto de ĉiu konkursa verko, inkluzive de la premiita, restos ĉe la aŭtoro.

2. La konkursaĵoj estu laŭeble maŝinskribitaj. Oni sendu kvar ekzemplerojn de ĉiu rakonto, per kiu oni konkursas. Oni skribu sur ĉiu manuskripto pseŭdonimon, kiu efike kaŝas lian identecon, kaj skribu la pseŭdonimon sur apartan slipon kune kun sia nomo kaj adreso. Oni fermu la slipon en koverto kaj skribu la pseŭdonimon sur la koverto, kiun oni malfermos nur post la finjuĝo.

3. La konkursa kotizo, por kovri elspezojn de la korespondado, estas jena : el landoj, de kie oni rajtas sendi respondkuponojn, tri respondkuponoj (maldekstre stampitaj; bonvolu kontroli tion) aŭ malpli, laŭ la enlanda permeso. Por landoj, kie estas malpermesita la sendo en eksterlandon de respondkuponoj, la partopreno estas senpaga. Hispanoj sendu dek pesetojn.

4. Oni sendu ĉion al la sekretario de la konkurso por la premio "Comella-Bassols" : s-ro Francesc Vila, Estoril 9, BARCELONA, Hispanujo. La limdato por la ricevo de konkursaĵoj estas la 28-a de februaro 1959.

Gerald C. Jervis,
Sekretario de la Belartaj Konkursoj de UEA.

FONDAĴO-ZAMENHOF

Antaŭa sumo : 2893,58 gld.

Novaj kontribuoj : A. G. Tiller, Svedujo 3.67 gld.; Alma Hedlund, Svedujo 11.02 gld.; V. kaj H. Tietti, Finnlando 23.— gld.; Svisa Esperanto-Societo 173.80 gld.; S. E. Treffers, Nederlando 5.— gld.; Ges. E. Laurie, Britujo 53.25 gld.; John P. W. Murray, Britujo 5.33 gld.; D-ro Maillard, Francujo 166.— gld.; S-ro Jullien, Francujo 24.90 gld.; S-ro Pion, Francujo 2.49 gld.; J. Duthilleul, Francujo 8.30 gld.; C. P. Winchcombe, Aŭstralio 7.— gld.; F-ino C. M. Burger, Nederlando 25.— gld.; Frato Marmou, Francujo 2.61 gld.; Esperanto-Grupo Erlangen, Germanujo, 22.62 gld.; Esperanto-Grupo Herrenalb, Germanujo 18.10 gld.; Jürgen Priess, Germanujo 4.52 gld.; Wilhelm Wingen, Germanujo 18.10 gld.; Fritz Janssen, Germanujo 6.33 gld.; Klara Walden, Svedujo 14.64 gld.; N.N. en V., Nederlando 10.— gld.; Wanganui Esp. Klubo, Nov-Zelando 95.85 gld.; José de Marques, Angola, 6.58 gld.; A. J. Papworth, Usono 3.76 gld.; Bertil Englund, Svedujo 10.— gld.; J. Vojdlich, Jugoslavio, 6.— gld.; Prof. Slobodan Petrović, Jugoslavio, 3.— gld.; Prof. Boža Popovič, Jugoslavio 36.— gld.; C. van der Graaf, Nederlando 4.— gld.; Axel Ahlgrist, Svedujo 21.43 gld.; Gunvor kaj Bertil Åkersberg, Svedujo 15.— gld.; F-ino A. Ekbom, Svedujo 7.35 gld.; Karl Bengtsson, Svedujo 7.35 gld.; Elsa Hessler, Svedujo 7.35 gld.; Inĝ. F. Turner, Svedujo 36.73 gld.; T. Teukku, Finnlando 5.— gld.; S-ro Lavisse, Francujo 4.15 gld.; F. Alsina, Hispanujo 7.20 gld.; J. Ernesto Guillem, Hispanujo 3.24 gld.; "Je memoro de mia patrino" S-ino Elly Staes, Belgujo, 38.— gld.; Francisc Vilá, Hispanujo, 2.50 gld.; Isidoro Berniol, Hispanujo, 1.25 gld.; College Adult Education, Manchester, Britujo 10.65 gld.; H. W. Allen-Smith, Britujo 1.07 gld.; G.H.Y., Britujo 1.20 gld.; F-ino N. Hanson, Britujo 5.33 gld.; S-ino LA. Evans, Britujo 5.33 gld.; F-ino M. Boulton, Britujo 31.95 gld.; J. Beresforde, Britujo 10.65 gld.; F-ino M. E. Smith, Francujo 15.98 gld.; Brita Esperantista Asocio 58.58 gld.; S-ino E. B. Knight, Britujo 15.98 gld.; Gino Catarzi, Italujo 5.— gld.; Fr. Couwenberg, Belgujo 7.60 gld.; Leon Paeleman, Belgujo 7.60 gld.; Kamiel Vanhulle, Belgujo 7.60 gld.; Morris Gapoola, Usono 37.82 gld.; S-ro Støp-Bowitz, Norvegujo 5.32 gld.; Bruĝa Grupo Esperantista, Belgujo 15.15 gld.; D-ro Tortel, Francujo 3.60 gld.; Th. de Goey, Nederlando 5.— gld.; D-ro W. Treude, Germanujo 90.48 gld.; D-ro J. Kreutzer, Germanujo 13.57 gld.; D-ro Inĝ. W. Groth, Germanujo 9.05 gld.; F-ino Frida Christaller, Germanujo 9.05 gld.; K. Selton, Germanujo 4.52 gld.; F-ino Pepita de Caspary, Norvegujo 5.— gld.; H. V. Rasmussen, Danlando 5.47 gld.; J. A. Wright, Kanado 19.55 gld.; Otto Neuendorf, Germanujo 9.05 gld.; F. Schulte, Germanujo 10.86 gld.; Fr. Helfers, Germanujo 11.76 gld.

Entute 4260,77 gld. je 1-8-'58.

RADIO

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

Por tempoj kaj ondlongoj, vidu la julian numeron, p. 124.

Radio Zagreb. 4-IX, Raportaĵo pri la junulara laborbrigado; 11-IX. "La unua amo", humoraĵo; 18-IX, Intervjuo kun Inĝ. Ferenĉič pri Birmio kaj Japanio; 25-IX, Novaĵoj el la movado kaj respondoj al korespondantoj.

Radio Roma. 2-IX, Italaj kanzonoj en Esperanto; 3-IX, Kuriero de Esperanto; 5-IX, Ĉirkaŭaĵo de Napolo : La Flegreaj Kampoj; 9-IX, Novaĵoj el Italujo; 10-IX, Kuriero de Esperanto; 12-IX, Leterkesto kaj bibliografio; 16-IX, Italaj kanzonoj en Esperanto; 17-IX, Kuriero de Esperanto; 19-IX, Antikvaj italaj popoloj : la Etruskoj; 23-IX, Italaj regionoj : Umbrio; 24-IX, Kuriero de Esperanto; 26-IX, La eksperimenta Centro por operkantistoj en Spoleto; 30-IX, La grandaj Sanktuloj : Sankta Hieronimo.

TROVITAĴOJ EN MAINZ

Dum la Kongreso en Mainz estis trovitaj pluraj objektoj : En la akceptejo :
fotoaparato en bruna leda ujo; en aŭtobuso : nigra lana sinjorina veŝto en kies poŝo troviĝas foto pri grupo en stacidomo.

La objektoj troviĝas nun en la Centra Oficejo de U.E.A. en Rotterdam. Personoj kiuj perdis similajn aferojn bonvolu turni sin kun preciza priskribo de la perditaĵoj al nia oficejo, Eendrachtsweg 7, Rotterdam, Nederlando. Direktorino C.O.

La Internaciaj Konkursoj 1958

Stato je la 31-a de julio 1958

Konkurso I

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Pollando	6150	6395	103.98
2.	Brazilo	7011	7098	101.24
3.	Germanujo	6865	6471	94.26
4.	Nederlando	5567	5064	90.96
5.	Svedujo	6945	6290	90.57
6.	Francujo	7647	6807	89.02
7.	Britujo	6963	5984	85.94
8.	Danlando	2743	2243	81.77
9.	Hispanujo	2508	1969	78.51
10.	Usono	3225	2505	77.64
11.	Svislando	2185	1690	77.35
12.	Belgujo	1907	1437	75.35
13.	Norvegujo	2144	1556	72.57
14.	Finnlando	2765	1915	69.26
15.	Italujo	4030	2665	66.13
16.	Jugoslavio	3800	2080	54.74

Konkurso II

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Portugalujo	560	605	108.03
2.	Aŭstralio	1228	1240	100.97
3.	Izraelo	240	240	100.—
4.	Kanado	440	415	94.32
5.	Sudafriko	235	215	91.49
6.	Aŭstrujo	1505	1345	89.37
7.	Islando	315	270	85.71
8.	Novzelando	955	815	85.34
9.	Japanujo	1280	1055	82.42
10.	Urugvajo	414	275	66.43
11.	Argentino	1005	555	55.22
12.	Maroko	659	355	53.87

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

EENDRACHTSWEG 7 ROTTERDAM C. NEDERLANDO

OFICIALA INFORMILO

La 1-an de aŭgusto 1958

N-ro 307

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de julio kaj ankaŭ por komparo je la fino de julio 1957:

	1957		*1958*	
Asociaj membroj	13270		12923	
Individuaj membroj				
MJ	775		719	
MA	5302		4695	
MS	657		519	
Pat.	5		5	
DM	299		305	
HM	52		46	
JMJ	14		14	
JMA	96		93	
		7200		6396
		20470		19319

DELEGITOJ

Argentino

Buenos Aires FD (komerco) : vakas.
Rosario (Sante Fe) VD : vakas. FD (filatelo) : vakas.

Aŭstralio

Wyalkatchem (Western Australia) D : S-ro John S. Finch, c/o Hospital Wyalkatchem.

Aŭstrujo

Knittelfeld (Stirio) FD (juro) : D-ro Adolf Halbedl, advokato, Bahnstr. 45.

Belgujo

Ottignies FD (vegetarismo) : vakas.

Brazilo

Fortaleza (Ceará) D : vakas.
Rio de Janeiro (D.F.) FD (religioj) : vakas.
Uberlândia (Minas Gerais) D : S-ro Wutke Carlos de Almeide, veterinaro, Caixa Postal 206, Av. João Pinheiro 768.

Britujo

Bellingham (Northumberland) FD (arkeologio) : S-ro Martin Sumner, edukista administranto, Spion Kop, Wark, Hexham.
Keighley (Yorkshire) D: S-ro Leonard George Livett, kontisto, "Thornham" Southlands Grove, Riddlesden. FD (kontistaj aferoj) : la D.
London N. 15. D : S-ro Alfred William Rowe, asekura oficisto, 84 Greenfield Road, South Tottenham. FD (asekuro) : la D.
London SW 12 (Balham) FD (turismo): S-ro Philip Buttinger, instruisto, 48, Ormely Road.
Stoke-on-Trent (Staffordshire) D: S-ro Horace Barks, fervojisto, 25 Mars St., Smallthorne.
Welling (Kent) FD (geografio): S-ro A. W. Thomson, komizo, 315 Bellegrove Road.
Willenhall (Staffordshire) FD (rotario): S-ro Ernest J. Parkes, muzika instruisto, 99 New Road.

Bulgarujo

Stara Zagora D: S-ro Petko Bonev, instruisto, str. "Asen Velčev" No. 95.

Ĉeĥoslovakujo

Lázně Jeseník (Morava) D : S-ro Vladislav Pečinka, maŝinŝlosistoveldisto, Rudé Náměsti 144.

Danlando

Odense (Fyn) D : S-ino Ingeborg Iburg, dommastrino, Møllebakken 2, Sct. Clemens.
Rønne (Bornholm) VD : S-ro Bent W. Andersen, bibliotekisto, Rosenvej 15. FD (bibliotekoj) : La VD.

Finnlando

Helsinki (Uudenmaan lääni) FD (laboristaj aferoj) : vakas.

Francujo

Agen (L. et G.) D : S-ro Emile Boone, pensionulo, Route de Cazalet, Bon-Encontre.
Aix-en-Provence VD : S-ro Pierre Boulogne, eks-profesoro, Villa Clarté, Route des Alpes.
Argenton s/Creuse (Indre) D : S-ro Félicien Baronnet, emeritulo, La Croix de Laumay. FD (instruado) : la D.

Evreux (Normandio) D : S-ino Nadège Bellettre, preskorektistino, 35, boulevard Saint Germain.

Mont Saint Martin D : S-ro Roger Degrelle, pastro, 27 Boulevard de Metz. FD (katolikismo) : la D.

Roubaix FD (radioamatora elsendo) : S-ro Jacques Luce, poŝtoficisto, 28 rue des Champs.

Saint-Pierre-des-Corps (Indre et Loire) D : F-ino Monique Hervé, helpinstruistino, 27, rue Maxima-Bourdon.

Germanujo

List (Sylt) D : S-ro Berthold Fischer, instruisto, M.V.S.

Münster (Westf.) VD : S-ro Werner Flick, dungito, Antoniusstr 39 III.

Neustadt (Holst) D : vakas.

Hindujo

Chembur (Bombay 38) VD : Bhikshu Anuruddha, monaño, S. Khanna "Vinod Mahal" 11th Road. FD (lamaismo kaj budhismo) : la VD.

Hispanujo

Barcelona FD (instruado) : S-ro Jaime Aragay Pujols, profesoro, Str. Sans 292, Bajos.

Sabadell (Barcelona) FD (literaturo kaj lingvoj) : S-ro Vicente Mateu-Nouvilas, oficisto, General Mola st. 92.

Hungarujo

Esztergomtábor JD : S-ro Imre Ferenczy, medicina studento, Sátorköiut 8.

Italujo

Catania (Sicilia) D : S-ro Giovanni Bruno, instruisto, Via Romeo 35.

Firenze VD : F-ino Elvira Piccioli, instruistino, Via Eleonora Pimentel 6.

Livorno (Toscana) FD (bankaj aferoj) : S-ro Mario Fusco, bankoficisto, Via Lepanto No. 41/5. FD (turismaj aferoj) : S-ro Augusto Buonafalce, oficisto, Via della Venezio 11.

Jugoslavio

Ljubljana (Slovenija) FD (turismo) : vakas.

Novi Sad (Vojvodina) FD (metiomekaniko kaj kalkulmaŝino-riparado) : S-ro Stevan Biro, preciza-meĥanikisto, Grobljanska ul 12.

Kubo

Camagüey (Cam.) D : S-ro Raúl Juárez-Sedeño, kontisto, Apartado 570. FD (ekonomio) : la D.

Maroko

Kenitra FD (poŝto) : vakas.

Sahelboutahar (Fez) D : S-ro Pierre H.M. Faivre-Duboz, agrikulturisto.

Nederlando

Groningen FD (komerco) : S-ro Marten Koopmans, komercvojaĝisto, Zuiderkuipen 17a.

Rotterdam FD (filmarto) : S-ro Glauco Pompilio, oficisto, Eendrachtsweg 7.

Norvegujo

Odda (Hardanger) D : S-ro Trygve Reisaeter, elektristo, Vasstun.

Novzelando

Wanganui D : F-ino Esme M. Shaw, sekretariino, 90 Glasgow Street.

Pollando

Dzierżoniów (woj. wroclawskie) D : S-ro Jan Szurman, librotenisto, ul. Dubois 20/2.

Katowice (Silezio) FD (kinematografio) : S-ro Zbigniew Höller, kinematografia-oficisto, Jagiellònska 36/2

Kraków VD : S-ro Alojzy Turek, oficisto, Kielecka 17/5. FD (jurnalismo): S-ro Emil Mayer, redaktoro, Floriánska 4. FD (literaturo) : S-ro Alojzy Turek, oficisto, Kielecka 17/5.

Lódź JD : S-ro Andrzej Zatke, studento, al. 1 maja 32.

Noway Targ D : S-ro Stanislaw Peksa, advokato, Rynek 13.

Przesieka D : F-ino Julia Pióro, instruistino, k/Jeleniej Góry. FD (instruo de krishnamurti) : la D.

Szczecin FD (libro-antikvaĵoj) S-ro Jan Maziakowski, libro-antikraĵisto, ul. Jana Styki 8/2.

Szczyrzyc D : S-ro Antoni Gucwa, sacerdoto-monaño de Ord. Cist, 1, distrikto Limanowa.

Portugalujo

Funchal (Madeira) FD (inĝenieraj aferoj) : S-ro Hugo Amaral, inĝeniero, Rua do Lazareto, 39 D.
FD (medicino) : D-ro José C. Tavares da Silva, kuracisto, Rua das Cruzes 20, Apartado 275.

Sovet-Unio

Moskva FD (lingvoscienco) : S-ro E. Bokarev, profesoro-lingvisto, Volĥonka 18/2, Inst. Jazyznanija.

Tallinn (Estonio) D : S-ro Eduard Tamm, eks-poŝtoficisto, Hôimu str. 28.

Svedujo

Hälsingborg (Skäne) VD : S-ino Asta Assarsson, telefonistino, Fägelsangsgatan 16-18. FD (fervojistaj aferoj) : S-ro Erik Begtsson, fervojisto, Jönköpingsgatan 35c III.

Hova (Västergötland) FD (filatelo) : S-ro Torsten Andersson, frizisto, Fack 24.

Karlskrona (Blekinge) D : S-ro C. E. Aldsten, maŝinisto, Björkholmsplan 13-4. VD : S-ro Edvin Porsbring, ĉefmaato, Himarkavägen 6. FD (vegetarismo) : la VD.

Säffle (Värmland) FD (presado, multilith) : S-ro Sven Kärrefors, oficisto, Järnvägsgatan 13.

Sala (Vestmanlando) D : vakas.

Stockholm FD (elektrotekniko): vakas.

Svislando

Bern FD (magio) : vakas.

Chur/Coire D : vakas. FD (transporto) vakas.

Muri (Aargau) D : vakas.

Selzach (Solothurn) D : S-ro Hans Werner Grossmann, studento, Dorfstr. 179.

Usono

Binghamton (N.Y.) D : S-ro Willy Sieler, seruristo, 153 Murray Street.

Brookline (Massachusetts) FD (skoltismo) : S-ro Thomas Duncan, bankoficisto, 73, Winchester Street.

Franklin Square D : vakas.

Guilford (North Carolina) D : S-ro David Neave, brikmasonisto, Route 1, Box 74. FD (astronomio) : la D.

New York 32 D : S-ro John Futran, elektroteknikisto, 601 West 164th Street, apt. 41.

NOVA DUMVIVA MEMBRO

Repini, S-ro Gino Luis, Caseros, Argentino.

NOVA PERANTO

Juárez-Sedeño, S-ro Raúl, Apartado 570, Camagüey, Kubo.

DONACOJ AL ĜENERALA KASO

H. W. King, Aŭstrujo 8.84 gld.; S-ino E. Meyerhubur, Germanujo 22.62 gld.; N.N. 1.25 gld.; N.N. en V, Nederlando 5.— gld.; Hjalmar Olsson, Svedujo 14.69 gld.; W. Siefermann, Germanujo 1.81 gld.; C. P. Winchcombe, Aŭstralio 7.— gld.; Th. Magnusson, Islando 21.30 gld.

FONDAĴO-EKSPOZICIO

N.N. en San Diego, Usono, 41.46 gld.; Hjalmar Olsson, Svedujo 14.69 gld.; N.N., Cal., Usono 41.53 gld.

OFICEJA ILARO

N.N. en V., Nederlando 5.— gld.
Al ĉiuj donacintoj tre koran dankon.

M. H. VERMAAS,
Direktorino C.O.

ANONCETOJ

Koresponda Servo Mondskala. Nuntempe, multaj adresoj haveblaj el Estonio, Francujo, Pollando, Japanujo, Jugoslavio, Bulgario. Skribu indikante viajn sekson, aĝon, profesion al: Daniel Luez, Laon (Aisne), Francujo, kaj enmetu respondkuponon por ĉiu petata korespondanto.

Por restarigo de esperantista lernejo ni bezonas a) infanojn, b) domon, c) monon. Ni malsukcesis nur pro manko de infanoj, kiujn ni nun serĉas unuavice. Grupoj kaj fakasocioj, diskutu kaj skribu al S-ro Smith, Hilltop Farm, Brighton Road, Crawley, Sussex, Britujo.

La Navigantoj, Örebro, Svedujo, invitas vin partopreni senkostan korespondan kurson pri la kristana kredo. Kontraŭ respondkupono - se havebla - vi ricevos belaspektajn prospekton kaj unuan lecionon.

Unitarismo - Realigita Homaranismo. Mendu la jus aperintan 60-paĝan libron, kiu priskribas la kredon de unitaranoj kaj la realigon de la religiaj ideoj de Zamenhof; 11 steloj. Ni ankaŭ reeldonis "Life of Zamenhof" (Privat). 10 steloj. Pago al niaj perantoj en via lando eblas, Esperanto Press, Oakville, Ontario, Kanado.

Londona gastejo, agrabla loĝloko. Lito kaj matenmanĝo po 14 ŝ. 6 p. por ĉiu nokto. Prezoj malaltiĝas laŭ loĝdaŭro. Oni parolas Esperanton kaj la francan. D. Bytheway, "Flat Four", 1, Warrington Crescent, London W. 9, Britujo. Telefono Cunningham 4487.

Vokado Tutmonda grandskala. Ni sendos specialan poŝtkarton al ĉiuj helpantoj por ke ni pruvu la esperantan valoron. Sendu revuojn, librojn (precipe religian) ktp. al Adventista Teologia Fakultato, Ena. Esperanto Klubo, Catende — Pernambuco, Brazilo.

Pri mondurboj mi deziras informon prefere esperante aŭ angle. Mi esploras ĉu mia urbo deklaros "mondurbo". Williams, Box 365, Timaru, New-Zealand.

Deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn kun seriozaj kolektantoj tutmonde, kvanto kontraŭ kvanto. Respondo certa. S-ro Toma Luigi, Via Nuoro 58, Cagliari, Italujo.

Gejunuloj! Plurlingva revuo publikigas senpage vian korespondpeton. Montru la efikon de Esperanto por korespondemuloj! World Youth Benczur útca 34, Budapest VI, Hungario.

Mi deziras interŝanĝi korespondadon pri turismo, fotografaĵo kaj desegno. Skribu al S-ro Juan Bta. Feliu Bover, Calle Tapinería 10, Barcelona, Hispanujo.

33-jara instruisto kaj skolestro deziras korespondi kun ĉiu en la tuta mondo pri instruado, skolta movado, folkloro kaj kutimoj en fremdaj landoj. Respondo garantiata. A. Parla, Przemków, Zamkowa 5 pow. Szprotawa, Pollando.

11-jara knabo deziras korespondantojn Sud-Ameriko, Islando. Graeme Torr, 11 Miller St., O'Connor, A.C.T., Aŭstralio.

Mi deziras korespondi kun tuta mondo per bildkarto kaj interŝanĝi glumarkojn, nepre respondo. Vadas Mihály, Sarkad, Kiss U. 3, Hungarujo.

Monda Ligo, Koresponda kaj Interŝanĝa Klubo. Informojn donas: Eric Castell, Ryd, Svedujo.

Kolektantoj. Petu senpagan anonceton en "Esperantista Kolektanto" al Melo, 6 p- J. Ferry, St. Etienne, Francujo.

Kristanan Misiadon deziras multaj. Helpon donas: Albin Johansson, Brasagatan 6 B, Höganäs, Svedujo. Respondkupono dezirata.

Ridinde malalta (3 guld. aŭ 10 respondkuponoj) estas la jarkotizo de LA JUNA ESPERANTISTO eldono por gelernantoj, gejunuloj kaj gekomencantoj de HAGA ESPERANTO KUNLABOR-KOMITATO. Ĝi donas 23 jare 7 paĝojn de esperantajoj. Ĉiu abonanto rajtas senpage korespondanonci kaj ricevas ĉiujare surprizpremion! Post 1½ jaroj jam abonantoj en 17 landoj. Ni alvokas vin: abonu, varbu! Precipe Nederlandanoj bonvolu subteni nian utilan agadon! Adreso: Hoefbladlaan 107, Den Haag, Poŝtĝirkonto: 6304. Orienteŭropanoj pagu per esp.-libro aŭ esp. poŝtmarkoj. "Medalionoj" valoras por unu jarabono. Provnumero senpage havebla.

S-ro Gino Catarzi, Casella Postale 380, Verono (Italio) deziras aĉeti "La Plena Gramatiko" de K. Kalocsay kaj Waringhien, kiun li pagos per mono aŭ per ŝanĝo de valoraj libroj.

Muzikisto, 22-jaraĝa fraŭlo, deziras korespondi kun la tuta mondo, pri kompozicio. Tomás Allende, Flaquer 18, Prat de Llobre-Gat (Barcelona), Hispanujo.

Deziras korespondi kun fraŭlinoj pri temoj: interŝanĝo de gramofondiskoj, P.K., P.M. kaj leteroj 24-jara junulo, Alexander Kotas, Podzamcze 36, Jeza, Pollando.

38-jara oficisto deziras korespondi tutemonde pri ĉiuj temoj povas interŝanĝi bildkartojn. Por lingvostudadoj petas helpon en formo de internacie verkitaj lernolibroj, vortaroj, esp. gazetoj. Resp. garantiite. Zdzislaw, Kurzawa, Miedzyrzecz, Wkp, Hospitalo Obrzyce, Pollando.

Kanadajn kaj Usonajn poŝtmarkojn mi interŝanĝos kontraŭ egalkvanto pm. de via lando. Reginald S. Archall, 235-5th Avenue, Ville La Salle, Quebec, Kanado.

Al nova esperantista rondo studenta, kiu intencas okazigi taŭgan Esperanto-propagandan ekspozicion, samideanoj el tuta mondo bonvolu helpi per amasa alsendo de ĉiuspeca koncerna materialo, kiu atingu nin antaŭ la fino de oktobro 1958. Tiutempe ni okazigos ankaŭ LETERVESPERON por kiu ni esperas ricevi interesajn korespondaĵojn. Ĉion bonvolu adresi al: Esperantista Rondo ĉe la Vroclava Politekniko, Bulvardo de Wyspianski 27, Vroclavo, Pollando.

27-jara fraŭlo deziras korespondi pri ĉiutaga vivo kun geesperantistoj el ĉiuj landoj. Respondo garantiata. KOS Božidar, Pot na kolodvor 1, Kranj, Slovenio, Jugoslavio.

Pri muziko, fotografio kaj dentmedicino, protetiko deziras korespondi kaj interŝanĝi literaturon, muzikaĵojn kaj diskojn. Milivoj Tomaŝiĉ, P. Miškine, 9, Zagreb, Jugoslavio.

N. Nikolov, Šip. prohod 12, Sofia 13, interŝanĝas esperanto-lernolibrojn kaj propagandilojn en ĉiuj lingvoj.

Deziras korespondi tutmonde pri diversaj temoj, kaj precipe pri pedagogio, lernejteatroj kaj skoltaro. Mgr. Krausowa Maria, Sosnawiec, ul. Ostrogórska 13, m.l. Polujo (Pollando).

Publika dankesprimo

Okaze de la 30-jara datreveno de mia esperantistiĝo kaj 20-jara membreco en la Estraro de U.E.A. mi ricevis el la tuta mondo tiom da esprimoj de simpatio, ke estas por mi bedaŭrinde absolute maleble skribi al ĉiu unuope. Tial, profunde kortuŝita, mi ĉi-maniere tutkore dankas al ĉiuj geamikoj, kiuj kontribuis por la belegaj donacoj, al ĉiuj gratulintoj ĉu skribe ĉu buŝe dum la Kongreso, al la organizintoj, partoprenintoj kaj ĉeestintoj de la aranĝo en Mainz la 3-an de aŭgusto.

Ivo Lapenna.

la nica literatura revuo

sub ĉefredaktoreco de
Prof. G. Waringhien
kun kunlaborado de la plej famaj verkistoj
aperas ĉiun duan monaton
32/40 paĝa - - pošformato jare fr. fr. 400.- aŭ egalvaloro

Ricevas la abonojn :
En Francujo : R. Fiquet, Pošta konto 2259-98 Marseille
Alilande : Ĉiuj Ĉefdelegitoj kaj landaj Perantoj de UEA

PETU SENPAGAN SPECIMENON

Redakcio: 7, Av. Léon-Gourdault Choisy-le Roi (Seine) Francujo.
Administracio: 5. Bd. Stalingrad Nice (A-M)

Vagado sub Palmoj

Jean Ribillard

Belaj lingvo kaj stilo

Taŭgega legaĵo por perfektigaj kursoj

Prezo : 2,50 gld 10 steloj

Eldona fako de U.E.A.

Aŭtunaj feriaj kursoj

estos denove aranĝataj en **La Sporta Altlernejo** de **Vejle, Danlando, 19.-26. de oktobro,** plej bela tempo de la jaro, ĉar tiam portas ĉirkaŭaj arbaroj luksan multkoloran veston. — Kursoj : konversacia, perfektiga kaj daŭriga. Venu por lerni kaj ĝui. Petu senpagan programon ĉe

L. Friis, Ingemannsvej 9,
Aabyhöj, Danlando.

Por la emantaj al normigita kaj simpligita lingvo laŭ principoj de ekonomio vortara

TUTA MATEMATIKO, MEKANIKO, KOSMOGRAFIO

Esperante pritraktitaj apud Aspa provo de logikaj kaj precizaj terminoj kun signifa interpunkcio 3300 terminoj el nur 1000 radikoj plejnombre komunlingvaj. 200 tajpitaj paĝoj. Afr 2300 frankoj

Por fakuloj pri vojo
LEKSIKONO PRI VOJOJ

1200 Esperantaj terminoj de nuna ŝosea tekniko kun difinoj. Afrankite 500 frankoj Francaj. Broise inĝeniero pri publiklaboroj, rue Philippière **Longue** (Maine et Loire), **Francio** pošt. ĉekkonto Nantes 874 79

Biografiaj informoj pri D-ro L. L. Zamenhof

Lia vivo — Liaj vojaĝoj
de Roland Jossinet

Multobligita broŝuro eldonita de C.E.D.

Ricevebla de la Centra Oficejo kontraŭ unu int. respondkupono

Gratulu por
Kristnasko kaj la Nova Jaro
per
„Malnovaj Holandaj Majstroj"

(12 diversaj reproduktaĵoj de famaj pentraĵoj, delikate presitaj kun esperanta teksto).

Serio de 6 diversaj duoblaj kartoj kun kovertoj :

3.— gld; 12 steloj

MENDU NUN ĈE U.E.A. !

BELARTO

Belega kajero, unika en la Esperanto-literaturo.

Multaj ilustraĵoj i.a. kolorbildo
Mendu ĝin tuj ĉe U.E.A.

Prezo : por membroj 2.75 gld. 11 st.,
por nemembroj 3.25 gld. 13 st.

ANGLA ANTOLOGIO

1000-1800

Unika verko pri grava literaturo
Redaktis : **William Auld** kaj **Reto Rossetti**
Eldona Fako de U.E.A.
Prezo : 10.- gld.; 24.- steloj
Mendu ĉe U.E.A.

ENERGIE VARBU REKLAMOJN POR JARLIBRO 1959 ! !

GRAVA KOMUNIKO

POR LIBROSERVOJ KAJ LIBROAMANTOJ

U.E.A. transprenis la stokojn de **PORTUGALA ELDONA RONDO** kaj de nun vendas ĝiajn librojn kun eldonista rabato al revendistoj, je aĉeto de minimume 5 ekzempleroj.

Bonega kulturserio je ege moderaj prezoj

Taŭgega legaĵo por kursoj de progresantoj

Bonvenaj donacoj kiel premioj en klubaj konkursoj ktp.

Galileo Galilei (B. de J. Caraça)	1.70 gld.	**Historio de Nederlando** (A. da Silva) . .	0.50 gld.
Vivo de Zola (A. da Silva)	2.— gld.	**Historio de Usono** (A. da Silva)	0.50 gld.
Vivo de Nansen (A. da Silva)	0.50 gld.	**La Portugala Literaturo** (A. da Silva) . .	0.50 gld.
Vivo de Pissarro (Rodo)	0.50 gld.	**La Prahistoria Arto** (A. da Silva)	0.50 gld.
Vivo kaj Arto de Goya (A. da Silva) . .	0.50 gld.	**La Budhismo** (A. da Silva)	0.50 gld.
La Vivo de l'Eskimoj (A. da Silva) . . .	0.50 gld.	**Pro tri Pingvenaj Ovoj** (A. da Silva) . .	0.50 gld.

APERINTA!

RETORIKO

kun aparta konsidero al esperanta parolarto

de

IVO LAPENNA

Dua eldono reviziita kaj kompletigita

Mendu ĝin tuj ĉe U.E.A. aŭ ĉe la aŭtoro

Prezo : 11.— gld., 44 steloj, bindita
9.— gld., 36 steloj, broŝurita

Eldono de la aŭtoro

Dum kvar semajnoj vendiĝis pli ol 400 ekzempleroj

Presita en Nederlando ĉe Zwagers, Rotterdam